

1973 majo
66-a jaro
n-ro 809 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

**INFANA
ESPERO:
P. 6-9**



Vi trovos

kiel ĉefan temon de ĉi tiu maja numero la uzadon de Esperanto en la familia vivo kaj la instruadon de la lingvo al junaj infanoj en tiu kadro. Plurlingva edukado de infanoj estis iam superstiĉe rigardata kiel malutila al la juna intelekto. Psikologiaj esploroj en la lastaj jardekoj ĝenerale trovis neniun bazon por tiu kredo. En ĉiu kazo, infanoj en tre multaj landoj de la mondo, kie mankas nacia lingva unueco, vole-nevole edukiĝas plurlingve, sen kio iliaj kontaktoj kun la eksterhejma mondo restus grave limigitaj. En mondo, kie grandegan porcion de la lerneja tempo englutas lingvo-studoj, denaska scipovo de pli ol unu lingvo estas evidente granda avantaĝo. Aparte atentinda, do, estas tiu plurlingva edukado, kiun praktikas multaj esperantlingvaj familioj, kaj kiu donas al la infanoj antaŭ ĉio mondampleksan rigardon al la vivo kaj senton de homara unueco. Tiaj familioj meritas konstantan kuraĝigon kaj ĉiam pli vastan imitadon.

Enhavo

- 81 Nova laborplano proponita (VS)
- 82 Ĉu komenco de interparolo?
- 82 Konferenco de UN-Asocioj
- 82 Edukado — grandparte lingvo-instruado
- 83 Babela EK kaj ĝia oficistaro
- 84 Por pli efika informado (15): Laboroj de la Centraj Organoj de UEA (Lapenna)
- 86 Supernacia konceptado ekde infanaĝo
- 89 Praktiko en la hejmo (Linz)
- 90 Sepa Kontinento (Petković)
- 91 Recenzoj
- 91 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 92 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 92 Leteroj de legantoj
- 93 Nekrologoj
- 94 Lerneja Bulteno n-ro 26
- 95 Esperanto en radio
- 95 UK Beogrado
- 96 Komenco bona — ĉio bona
- 97 TEJO-paĝo
- 98 Oficiala informilo n-ro 467
- 98 Kalendaro
- 100 Anoncetoj

La kovrilo

La ludoj de infanoj tra la mondo estas interesega esplorkampo. Ĉu anglaj infanoj, ekzemple, kiuj uzas por elekti aŭ decidi ion inter si malnovan lud-riton “ŝtono/papero/tondilo”, povus imagi, ke precize tiun saman ludon praktikas infanoj en Japanujo? Kiom da infanludoj estas komuna ligilo de popoloj plej diversaj? Per kiaj pravojoj misteraj ili diskoniĝis trans oceanoj kaj kontinentoj? Ĉi tiu knabo eble kantas kun ĉiu blovo al la leontodaj semoj: “Ŝi amas min — ne amas — amas — ne amas . . . ” ĝis la fina blovo decidis lian sorton. Sed niaj legantoj, memorante sian junaĝon en Moskvo, Lima aŭ Tananarive, eble interpretos lian ludon tute alisence. Kiel ajn, ĝi simbolu la esperon pri nova mondo sen lingvaj baroj kaj malkompreno . . .

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. **Fondita** en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910). **Ĉefredaktoro**: V. Sadler. **Redaktorino**: A. Woessink-Nagata. **Inkluzivas** la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo). **Aperas** monate (escepte de aŭgusto). **Abonprezo** por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld. **Anonc-tarifo**: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%. **Banko**: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando. **Poŝta ĝirkonto**: 37 89 64 (UEA). **Telefono**: (010) 36 15 39. **Telegramadreso**: ESPERANTO ROTTERDAM. **Kompostita kaj fotografita** en la Centra Oficejo de UEA. **Presita** ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando. **Legantoj** en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo. **Vic-prezidanto** kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo. **Ĝenerala sekretario** kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo. **Estrarano** pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo. **Estrarano** pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, 00-976 Warszawa 13, Poŝtkesto 100, Pollando. **Estrarano** pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo. **Estrarano** pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

NOVA LABORPLANO PROPONITA

La speciala Komisiono pri la Laborplano, starigita en Londono en 1971 por prepari projekton pri nova Tria Laborplano de UEA, finis sian laboron kaj dissendis detalan projekton al la membroj de la Komitato. La Komitato detale pritraktos la proponon dum la Universala Kongreso en Beograd.

Kvankam temas ankoraŭ nur pri propono, certe interesas la legantojn iom ekscii pri la ĉefaj punktoj, en kiuj la nova projekto diferencas disde la nun valida Dua Baza Laborplano akceptita en 1962. En la nova projekto ekzistas multaj re-formuloj, ekzemple pri la baza laborpolitiko de la Asocio, kiuj povas iom ŝanĝi la emfazon je tiu aŭ alia koncepto, sed kiuj fakte ne aldonas ion esence novan. Ĉi tie ni do ne priskribu tiajn reformulojn sed menciu nur la plej konkretajn kaj rimarkeblajn proponojn. Krom la jam ekzistantaj kategorioj de membroj kaj apogantoj de UEA la Komisiono proponas krei novan kategorion "interesitoj" (pri la internacia lingvo-problemo), kiuj "2-5 fojojn jare ricevu diversspecan materialon, por kio ili pagu proksimume la kostojn. (Tiu aktiveco okazu en la kadro de la Landaj Asocioj cele al informado kaj kreado de interesiĝo pri pli proksima rilato al Esperanto)".

"Uzantoj" kaj "agantoj" — distingendaj?

Potenciale grava estas nova alineo, kiu postulas klaran distingon inter "uzantoj" kaj "agantoj" en la movado. Laŭ ĝia teksto "Uzantoj estas tiuj, kiuj simple uzas la lingvon por propraj personaj celoj. La samon faras la agantoj, sed krome tiuj partoprenas aktive la internan organizan laboron aŭ la aktivecojn direktitajn al la ekstera mondo." La Komisiono proponas "analizi la bezonojn de tiuj 2 kategorioj kaj poste eltiri la konsekvencojn en la laborplano, organizado, informado ktp." Ĝi ne jam faras tian analizon, sed supozeble temus pri apartigo de la praktika aplikado de la lingvo disde la informado, instruado kaj organizaj problemoj, tiel ke, ekzemple, unu revuo pritraktus nur ĝeneralajn temojn kaj praktikajn aplikojn de la lingvo, dum alia estus rezervita por la veraj "agantoj", kiuj interesiĝas ĝuste pri tiaj temoj, kiel laborplano kaj instrumentadoj de Esperanto. Estas sendube, ke multaj novaj lernantoj de la lingvo rigardas sin kiel nurajn "uzantojn" kaj malmulte interesiĝas mem aktiviĝi por disvastigi la lingvon aŭ pristudi ĝiajn problemojn. Simila ideo aperas en posta alineo, kie estas proponite "Iom post iom transformi niajn organizaĵojn al unuflanke lingvo-politika kaj aliflanke disbranĉigita servo-organizaĵo, kiu laboras vaste sur kampoj, kie la socio havas jam establitajn interesojn kaj aktivecojn".

Sub la rubriko Informado aperis en la malnova Laborplano la tasko "dediĉi precipan atenton al agado en Azio kaj Afriko". Al tio la Komisiono aldonis "Suda

Ameriko", kio respegulas la kreskantan interesiĝon pri la lingvo en tiu kontinento kaj la rekonon, ke ankaŭ tie la movado frontas similajn problemojn, kiel en Azio kaj Afriko.

Alia propono mencias la eblecon krei serion da altkvalitaj, profesie aranĝitaj kaj ellaboritaj informbroŝuroj, kiujn povus uzi (kun baze sama enhavo kaj prezento, sed kompreneble en diversaj nacilingvaj eldonoj) la landaj asocioj. Efektive, multaj bonaj informiloj nacilingvaj nuntempe restas preskaŭ nekunataj ekster la koncerna lingva teritorio kaj povus esti pli vaste ekspluatataj rilate la enhavon kaj formon per iom pli da internacia kunlaboro.

Interesaj estas la sugestoj rilate landajn Esperantogazetojn. La Komisiono rekomendas, ke ili principe "spegulu la vivon, ideojn kaj vidpunktojn en la koncerna lando, tiel ke tio donas bazon de subteno al la asocio fare de publikaj kaso. Tiun parton verku elstaraj kaj talentaj verkistoj kaj ĵurnalistoj en la koncerna lando kaj ne amatoroj en la movado." Samtempe oni rekomendas, ke tiaj revuoj havu nacilingvajn resumojn de la artikoloj, por ke ili veku la interesiĝon de ekstera publiko, ekzemple en bibliotekoj kaj atendejoj. Dum kelkaj naciaj Esperantogazetoj estas nuntempe altnivelaj, pluraj aliaj baraktas por sia ekzisto-rajto, kaj eble estus por ili konvena momento rekonsideri sian tutan celon kaj karakteron.

Starigi parlamentajn grupojn

Sur la kampo de eksteraj taskoj la projekto de la Komisiono donas grandan emfazon al la agado ĉe landaj parlamentoj kaj registaroj. Ĝi proponas, ke en ĉiu lando la Esperanto-asocio daŭre klopodu varbi subtenon de parlamentanoj por la konata Propono de UEA al Unuiĝintaj Nacioj, interalie por krei dokumentan bazon por petoj al ŝtataj instancoj pri financa helpo. Krome, la landaj asocioj devus "preni iniciaton cele al starigo de grupo de parlamentanoj kun speciala intereso labori diversmaniere por Esperanto". Lasta propono sur tiu kampo estas, ke la landaj asocioj laboru por la starigo de naciaj esplorkomisionoj pri la internacia lingvo-problemo (supozeble sub ŝtata egido), en kiujn devus eniri ankaŭ elstaraj personoj kompetentaj pri Esperanto.

La sekcio de la malnova laborplano pri agado en lernejoj restas grandparte senŝanĝa en la teksto de la Komisiono. Nova estas tamen la rekomendo "Iniciati, instigi, mem entrepreni aŭ subteni ĉe ILEI aŭ aliaj ĉiuspecajn lerneajn eksperimentojn por prilumi la lerneblecon de Esperanto... Kvankam neniu, kiu lernis Esperanton, dubas pri ĝia relativa facileco, ekzistas tre malmulte da dokumentaj pruvoj pri tio, kiuj povus konvinki pedagogiajn fakulojn kaj aŭtoritatulojn, kaj tiu rekomendo ŝajnas des pli necesa en la nuna periodo, kiam oficiala eksperimenta instruado en ŝtataj lernejoj (la 5-landa eksperimento - vd. en "Esperanto" 1972, julio-aŭgusto, p. 121) estas jam realaĵo.

Ĉi tiu resume de nur kelkaj punktoj el la projekto de la Komisiono celis nur faciligi la komprenon pri iom detala kaj malfacile digestebla dokumentaro por pliaj diskutoj en kaj ekster la Komitato de UEA.

V. S.

ĈU KOMENCO DE INTERPAROLO?

Kiel raportite en la ĉina ĵurnalo *Renmin ribao* (Popola ĵurnalo) en la 6a de marto, japana kultura delegacio konsistanta el 10 reprezentantoj de la kultura medio inkluzive de 2 esperantistoj, nome la 88-jara prezidanto de la delegacio Toki Zenmaro kaj UEA-delegito Tokuda Rokuro, estis akceptita de la kulturaj reprezentantoj de Ĉina Popola Respubliko, inter kiuj troviĝas la en la registaro tre influhava Kuo Mo-ĵo.

Dum diversaj kontaktoj kaj vizitoj de ĉi tiu delegacio en Pekino kaj Ŝanhajo, s-roj Tokuda tre bone demonstris la naturan funkciadon de la Internacia Lingvo kun la Esperanto-parolantaj ĉinaj funkciuloj oficiale asignitaj por ili, sen helpo de la ĉin-japanlingvaj interpretistoj disponigitaj por la delegacio, el kiu, cetere, neniuj komprenis la ĉinan lingvon.

Interalie, s-ro Hujucz, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj s-ro Tokuda atingis interkonsenton pri pluraj punktoj de reciprokaj interŝanĝoj de Esperantaj grupoj, inkluzive de tiu el Ĉina Popola Respubliko al Japanujo okaze de la 60a Japana Esperanto-Kongreso en la venonta aŭgusto.

KONFERENCO DE U. N. - ASOCIOJ

La ĉi-jara tutlanda konferenco de la UN-Asocioj en Usono havis en sia oficiala tagordo temon pri la estonta per-satelita televida komunikado direktota al la tuta homaro (1973-01-31 ĝis -02-03).

La UEA-representanto ĉe UN s-ro Mark Starr kaj UEA-fakdelegito pri UN-aferoj s-ro John L. Lewine, oficiale partoprenante la konferencon, faris proponon menciiti en la konkludoj de la konferenco, ke tiu grandioza plano por vasta komunikado bezonos la Internacian Lingvon por pli granda interkompreno kun reciproka respekto.


Kvankam la eks-diplomato Charles Yost argumentis, ke nun ne estas oportune konsideri tion, triono de la tricento da partoprenantoj voĉdonis favore al la propono de s-roj Starr kaj Lewine.

En UN mem, spite de la jam "konstanta" deficitado de la UN-financoj, oni ne konsideras forigi la koston pro interpretado, kiu okupas 10% de la buĝeto.


EDUKADO — GRANDPARTE LINGVO-INSTRUADO

Kiom da horoj la studentoj en mezlernejoj konsumas por lerni fremdajn lingvojn? La apuda tabelo montras statistikon de s-ro W. D. Halls faritan antaŭ kelke da jaroj. Laŭ la rezultoj de la statistiko, la larĝasenca "edukado" en lernejoj, almenaŭ en Eŭropo, ŝajnas signifi instruadon de fremdaj lingvoj apud gravaj studobjektoj . . .*

* W. D. Halls, "Foreign Languages and Education in Western Europe" (Fremdaj lingvoj kaj edukado en Okcidenta Eŭropo), London, Harrap, 1970.



BABELA E. K. KAJ ĜIA OFICISTARO



La ĉefoficejo de Eŭropa
Komunumaro en Bruselo
(Belgujo)

El ĉiuj nuntempaj aspektoj de la monda lingvo-problemo, la situacio en la pligrandiĝinta Eŭropa Komunumaro (EK) estas unu el la plej interesaj kaj signifoplenaj. La fakto, ke pluraj ŝtatoj kun diversaj oficialaj lingvoj starigis al si la celon alstrebi paŝon post paŝo ĉiam pli intiman integriĝon, neeviteble konfrontas ilin kun la lingvaj baroj en maniero neniam antaŭe spertita.

EK, nun kun 9 ŝtatoj-membroj, havas la destinton, laŭ decido de ilia ĉefula konferenco, starti kiel Eŭropa Unuiĝo* ekde la jaro 1980. Precipe Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK), unu el la organoj de EK, jam de sia ek-ekzisto havas kiel celojn establi sociekonomian politikon komunan al la ŝtatoj-membroj, rearanĝi koncernajn ŝtatajn leĝojn tiucele kaj efektiviĝi la liberan moviĝon de homoj, laborfortoj, varoj interne de la komunumo.

EK kun sia granda perspektivo evoluas tiel rapide, ke ĝi jam havas preskaŭ saman nombron da oficistoj por siaj organoj kiel UN. Dum UN okupiĝas pri la bono de la socio de la tuta homaro, t.e. 3 600 000 000 da homoj, EK okupiĝas pri tiu de nur malpli-ol-dekono de ili, 250 000 000 (ambaŭ statistikoj en 1970).

Tamen, havante pli konkretajn celojn kaj disponigitajn povojn ol UN havas, EK jam multon efektivigis kaj intencas atingi i.a. eĉ la unuecigon de la mono, kies malsameco estas unu el la plej gravaj problemoj inter la landoj, kiel estas ankaŭ la lingva kaj la pasporta (ŝtataneca).

Kvankam ankoraŭ malgrandskale, oni jam parolas pri la unuecigo de la pasportoj de la EK-landoj, lasante libere kreski la problemon de la lingva kaoso.

Bunta dokumentaro

La dokumentoj de EK, jam de antaŭ la membriĝo de Britujo, Irlando kaj Danlando kolore distingitaj laŭ la lingvoj (ekz-e: la franca, verde; la germana, flave), lastatempe fariĝis pli kaj pli komplikaj. Iu altranga oficisto de EK, rigardante ĉielarke kolorriĉan paperaron, ĝemis: "La ideo de EK estas bona. Sed kia estas tiu inundo de lingvoj! — Kvazaŭ babeltura..."

Ne enkalkulante la oficistaron de la EK-organo "Euratom" (2 500 personoj en 1972, ĉefe teknikistoj), EK nun havas por siaj ceteraj organoj sepmilon da oficistoj (6 100 personoj en 1972). La konsisto de la oficistaro de EK estas laŭ la procentaĵoj fiksita surbaze de la grandeco de la EK-landoj: nome, Britujo, Francujo, F.R. Germanujo, Italujo kaj la triopo de la Beneluksaj landoj (Belgujo, Nederlando, Luk-

semburgo) po 18% kaj Danlando kaj Irlando kune 10%.

Kvarono de la tuta oficistaro de EK laboras ne por kreaĵoj kiel ellaborado de leĝoj, regularoj ktp. (necesaj por la nova EK) sed simple por interpretado aŭ tradukado. La pli granda parto de la okcento da novaj oficistoj, dungitaj kaj dungotaj pro la kresko de EK ekde ĉi tiu jaro, estas por traduk-laboroj.

Oficisto de EK — kun pluraj langoj

La minimuma kondiĉo por ĉiu *oficisto* estas, ke li havu ŝtatanekon de EK-lando, posedu ĝian lingvon kiel aŭ kvazaŭ sian gepatran lingvon kaj krome kapablu flue uzi unu el la ceteraj oficialaj lingvoj. Tio signifas, ke li devas esti almenaŭ dulingvulo.

Nun, post la membriĝo de la 3 pliaj landoj, la principo de la lingva egalrajteco komencis ŝanceliĝi. En anoncaro por varbado de *interpretistoj*, ĵus aperinta en la oficiala bulteno de EK, ĉiu kandidato el EK-lando "devas bone koni 2 el la 6 oficialaj lingvoj (franca, germana, angla, itala, nederlanda kaj dana)" krom la lingvon de sia ŝtato, kaj cetere estas klara mencio, ke "Tre bona kono de la franca, germana aŭ angla lingvo estas nemalhavebla" (— laŭ freŝa informo de d-ro Werner Bormann**). Tio signifas, ke unu el la 2 fremdaj lingvoj de varbata interpretisto devas esti unu el la 3 nomitaj (franca, germana kaj angla). Diskriminaciataj estas la ceteraj lingvoj: itala, nederlanda kaj dana.

En la lingva laboratorio situanta subtere de la ĉefoficejo de EK en Bruselo fervore studas lingvojn oficistoj de EK, eĉ oferante por tio la lunĉo-paŭzon. Multaj el ili vespere hejme aŭskultas lingvajn diskokursojn anstataŭ viziti amikojn. Temas ne pri profesiaj interpretistoj, sed pri ordinaraĵoj administrantoj. Por oficisto de EK estas fatale, precipe por akiri altan oficon, se li ne kapablas sekvi la lingvan kaoson per du, tri aŭ eĉ kvar lingvoj.

Estas kompreneble, ke en tia kreskanta konfuzo la organoj de EK serĉas ian simpligon. Malbona aŭguro tamen estas, ke nun en EK, apud la simple egalrajtaj lingvoj dana, itala kaj nederlanda, aperis nova kategorio de lingvoj "nemalhaveblaj" — la angla, franca kaj germana.

A.W.N.

* Eŭropa Unuiĝo evidente estos ne la unuiĝo de la tuta Eŭropo, sed la nuna EK mem kun pli da povoj super la reduktitaj "suverenaj rajtoj" de la ŝtatoj-membroj.

** Vd. ankaŭ lian artikolon "La lingva estonteco de EEK" en n-ro 794 de "Esperanto" (p. 21-22).

Laboroj de la Centraj Organoj de UEA

IVO LAPENNA

La klopodoj de la centraj organoj de UEA estas sufiĉe bone konataj, kvankam ne tiel atentataj, kiel ili meritis. Sciigoj en "Esperanto", cirkuleroj al la landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj, apartaj ĉapitroj en la ĉiujara Raporto de la Estraro donas multe da informoj ankaŭ tiurilate. Necesus, ke ĉiuj aktivuloj regule legu ilin.


Ĉi tie estu nur menciite, ke la ampleksa laboro konsistas el du fakoj: esploroj kaj dokumentado, unuflanke, kaj informado en strikta senco de la vorto, aliflanke. Pri la unua okupiĝas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), dum la alian prizorgas la Informa Fakoj de UEA, kiu, tamen, abunde utiligas ankaŭ la materialojn de CED. CED okupiĝas pri sciencaj esploroj kaj dokumentado en ligo kun la lingva problemo en la mondo, pri la historio kaj aktuala rolo de la Internacia Lingvo. La rezultoj estas publikigataj en formo de dokumentoj (ĉ. 24 ĉiujare), studoj, artikoloj, statistikoj, eĉ tutaj libroj. La ĉefaj publikaĵoj de CED estas: (i) *CED-dokumentoj* en 10 serioj (en Esperanto, la angla kaj, en kelkaj kazoj, en multaj aliaj lingvoj), sendataj al internaciaj instancoj kaj, interalie, al ĉiuj landaj asocioj; (ii) periodaĵo *La monda lingvo-problemo*, eldonata tri fojojn jare de la mondfama entrepreno Mouton & K-jo en Hago-Parizo, sub aŭspicio de CED; (iii) *La Internacia Lingvo – Faktoj pri Esperanto* (1954); (iv) *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro* (1960) kun multaj artikoloj kaj studoj, grandparte plu aktuala; (v) *Listo de Lokaj Esperanto-Societoj* (1965); (vi) *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj* (1970); (vii) *La problemo de lingva komunikado en la moderna mondo* (1971). Kun la escepto de (iii) kaj (v), ĉiuj menciitaj publikaĵoj estas ankoraŭ haveblaj. Ili enhavas amason da materialoj, bonege utiligeblaj ankaŭ por la celoj de rekta informado. Jam en 1973 aperos *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*, monumenta verko de ĉ. 550 paĝoj, ilustrita, kun detalaj indeksoj, kiu siavice liveros novajn, ĝisdatajn faktojn. La Universala Ekspozicio de CED estas siaspeca grandega dokumento pri la atingoj de Esperanto, bonege utiligebla por pli elstaraj aranĝoj.

Aliflanke troviĝas la Informa Fakoj de UEA. Interne de la movado ĝi laboras per cirkuleroj, skribaj kontaktoj kun la landaj IF kaj sepdeko da rektaj kunlaborantoj, apartaj kunvenoj de aktivuloj dum la universalaj kongresoj, la Informa Centro de UEA en Parizo, la Internacia Gazetara Servo (IGS), Kongresa Gazetara Servo (KGS) kaj aliaj rimedoj aŭ metodoj. Ekstere la IF de UEA prizorgas la informadon sur tutmon-

da nivelo: parte rekte per intervenoj ĉe la internaciaj instancoj aŭ en ligo kun eventoj havantaj internacian karakteron (ekz. gazetaraj konferencoj, intervjuoj, artikoloj k.s. okaze de universalaj kongresoj aŭ aliaj internaciaj renkontiĝoj); aliparte per harmoniigo de la tuta laboro kaj per helpo al la informado sur la landa, loka kaj faka niveloj.

La ĉefaj regulaj periodaĵoj de la IF de UEA estas: (i) *Bulteno de IGS* (entute 200 numeroj ĝis la fino de 1972) kun multaj objektivaj informoj, sendata al la LA, landaj IF kaj individuaj kunlaborantoj; (ii) *Angla-franca bulteno de IGS* (entute 68 numeroj ĝis la fino de 1972), sendata unuavice rekte al presagentejoj kaj al gazetoj en landoj sen Esperanto-organizaĵoj; (iii) *Bulteno de KGS*, regule publikigata dum la universalaj kongresoj (ekde la Pariza UK en 1950)

Ĉi tiu dulingva (Esperanta-ĉeĥa) stratindiko ornamas vojon en Příbor, Ĉeĥoslovakujo. Sentrude ĝi tamen konstante memorigas la preterpasantojn pri la lingva problemo, kiun frontas precipe ŝoforoj en Eŭropo.



en Esperanto kaj en la nacia lingvo de la kongreslando; (iv) *Impulsoj* (ekde decembro 1972), dediĉita precipe al studado de psikologiaj aspektoj de varbado; (v) *Eltondajna Servo* (lanĉita en septembro 1972) kun fotokopioj de bonaj artikoloj pri Esperanto en diversaj naciaj lingvoj, aŭ de misprezentoj kaj atakoj, en kiu kazo la IF taŭge komentas. Krome, la IF eldonis diversajn flugfoliojn, interalie la konatan 6-lingvan plurfoje, internacie uzeblajn afiŝojn, poŝtkartojn kaj similajn materialojn.


Necesas ne forgesi la grandegan informan signifon de la mondaj kampanjoj de UEA. Ĉiu el ili — ekzemple okaze de la Peticio al Unesko, aŭ Zamenhof-Jaro, aŭ Jaro de Internacia Kunlaboro, aŭ Propono al UN, k.a. — laŭplane mobilizis kaj kunligis ĉiujn fortojn de CED kaj ĝiaj kunlaborantoj, ĉiujn rimedojn de la informa aparato sur ĉiuj niveloj, kio donis elstare rimarkindajn rezultojn el kvanta kaj kvalita vidpunktoj. Efektive, tiaj mondscale organizitaj agadoj de intensaj dokumentado kaj informado tuŝis en tiu aŭ alia formo milionojn da homoj.

Konkludo

Estas sendube, ke multo jam estas farita kaj plu farata por diskonigi la lingvon, sed estas ankaŭ certe, ke eĉ pli estas farebla kaj farenda. Tio rilatas al ĉiuj aspektoj de informado, sed precipe al interna organiziteco, amasigo kaj plibonigo de la kvalito.

La organiza aparato de UEA konsistas el la centra IF de la Asocio kun ĝiaj rektaj kunlaborantoj, el informaj fakoj (IF) de la landaj organizaĵoj kaj lokaj societoj. Por plibonigi la informadon necesas, unuflanke, pli firme kunligi vertikale kaj horizontale la ekzistantajn IF kaj aliajn centrojn de informado, kaj, aliflanke, funkciigi novajn. Multaj LA jam havas siajn IF, sed multaj aliaj ankoraŭ ne formis la siajn. Urĝa tasko estas krei ilin. Informado en la moderna mondo devas ne esti afero senpripensa, hazarda aŭ sporada, sed daŭre studata, bone planita kaj sistema. Tion plej sukcese povas realigi aparta fako aŭ eĉ nur kompetenta komisiito en la sino mem de la LA kaj tiel en konstanta kontakto kun la aliaj agadbranĉoj. La taskoj de la landaj IF estas: (i) organizo kaj prizorgo de informado sur siaj teritorioj konforme al la interkonsentita ĝenerala informa politiko de la Asocio; (ii) kontaktoj kun la tutlandaj kulturaj, politikaj kaj aliaj instancoj; (iii) rekta informado pere de la tutlandaj rimedoj de komunikado; (iv) konsiloj kaj helpo al la lokaj IF, aŭ individuaj lokaj kunlaborantoj, per liverado de artikoloj, novaĵoj, flugfolioj kaj aliaj materialoj, utiligante tiucele ankaŭ la publikaĵojn de la centraj organoj de UEA. Siavice, ne kelkaj, sed ĉiuj lokaj societoj devus havi siajn IF aŭ komisiitojn por prizorgi la informadon sur loka-regiona nivelo konforme al la ĝenerala informa politiko de la propra LA. Nur tiamaniere estas eble atingi, ke la tuta terglobo estu maksimume kovrita per la reto de la informa aparato de la organizita Esperanto-movado.

Plifortigo de la organiza strukturo aŭtomate kaŭzos amasigon de la informado. Krome, ankaŭ unuopuloj,



Konstanta atentigilo pri la Internacia Lingvo estas la esperantlingvaj instrukcioj, kiuj troviĝas inter tiuj en pluraj naciaj lingvoj en telefonĉeloj ĉie en Nederlando. Estus tre dezirinde uzi tiun nederlandan precedencon por atingi la samon alilande.

agantaj spontane kaj proprainiciate, povos pli efike partopreni, kio plu kontribuos al amasigo. Efektive, eĉ portado de la insigno (ne multaj sed unu), aŭ simpla konversacio (ne altruda, sed natura) en flua Esperanto, apogas la informadon en la plej ĝenerala senco de la vorto. Des pli helpas skribado de taŭgaj leteroj al la redakcioj kaj similaj iniciatoj de unuopuloj. Granda nombro da alispecaj atentigoj pri la Internacia Lingvo, same tiel, subtenas la organizitan informadon. Al tiu kategorio apartenas, ekzemple, stratoj kaj placoj, monumentoj kaj memortabuloj, konstruaĵoj kaj ŝipoj, k.s., kun la nomo Esperanto aŭ Zamenhof. Menuoj en Esperanto havigeblaj en la restoraciaj vagonoj de la entrepreno Cooks, aŭ Esperantlingvaj instrukcioj en ĉiuj publikaj telefonĉeloj por interloka kontakto en la tuta Nederlando, aŭ ŝildoj "Esperanto parolata" en hoteloj, vendejoj ktp. certe signifas parteton de la lingva aplikado en la ĉiutaga praktiko, sed samtempe ankaŭ apartenas al la speco de konstanta, diskreta apogo al informado.

Tiuj kaj multaj aliaj similaj "atentigoj" pri Esperanto trovas sian lokon en la framo de la organizita informado, kies gamo de eblecoj estas preskaŭ senfina: ĝi etendiĝas de science bazitaj studoj ĝis simpla nekaŝado de sia propra scio de Esperanto. Nenio malhelpas, ke tiaj "atentigoj" plurfoje milobliĝu kaj tiamaniere kontribuu al la necesa amasigo de informado. Ĉiu unuopulo povas almenaŭ iom partopreni en la klopodoj en tiu direkto.

Pri la kvalito estas jam tiom dirite en la antaŭaj partoj, ke apenaŭ eblas iom aldoni. Nek la organiza fortikigo, nek la amasigo sufiĉas per si mem. Ili devas esti akompanataj de kvalitaj plibonigoj, se oni volas, ke la informado donu multe pli bonajn rezultojn en la estonteco.

Kaj kiu ne volas tion?

Sekve de la kresko de internaciaj geedziĝoj per Esperanto jaro post jaro, kreskas ankaŭ la nombro de la denaskaj Esperanto-lingvuloj. Tio estas "unika fenomeno" en la senco, ke ĝenerale oni ne scias multon pri tiu fakto. Aliflanke ĝi estas tute "natura fenomeno" por tiuj, kiuj ofte uzas la Internacian Lingvon. "Mi ne memoras, kiu aŭ kio influis min en la decido uzi Esperanton ĉe miaj infanoj, sed feliĉe, ekde la naskiĝo de mia unua filino, mi formis la kutimon paroli ĉe ŝi en tiu lingvo. Unue ĝi estis same nekomprenebla por ŝi kiel la nacia, do mi ne vidis kialon ne uzi ĝin! Kiam la semajnoj iĝis monatoj, mi trovis, ke mi povis komprenigi min al ŝi ne pli malfacile, ol aliaj povas per la nacia lingvo. Krome, Esperanto estis fariĝanta ĉe mi plene natura lingvo por la unua fojo. Tiel la kutimo fiksiĝis, kaj baldaŭ ŝajnis iom strange al mi paroli al nia bebo en alia maniero..." (Eric Revill: "Esperanto kaj infanoj en la familio", *British Esperantist*, 1962a septembro).

Tiel burĝonas denaskaj esperantlingvuloj ĉe paroj, nesamnacilingvaj kaj samnacilingvaj.


Kiel nomi tiajn infanojn? Pro rezisto al la logike ne konvena tradicia esprimo "denaskaj esperantistoj" ekestis ĝis nun diversaj aliaj formoj: "denaskaj esperantanoj", "denaskaj Esperanto-parolantoj", "denaskaj esperantlingvanoj", "denaskaj Esperanto-uzantoj" kaj "denaskaj esperantlingvuloj", kiun lastan apogas d-ro A. Albault, akademiano, mem havanta tiajn infanojn.

Antaŭ du jaroj la redakcio de *Esperanto* faris enketon pri diversaj aspektoj de la denaskaj esperantlingvuloj. La enketiloj estis dissenditaj al 55 familioj en 25 landoj. 45 familioj el la 55 troviĝas en Eŭropo en larĝa senco; po 1 en Afriko kaj Oceanio, 3 en Azio, 5 en la norda kaj suda Amerikoj. La geografie ne ekvilibra distribuo estis kaŭzita de tiu de la tuta esperantistaro nuntempa kaj ankaŭ de manko de aktuala listo de la familioj kun denaskaj esperantlingvuloj.

Multe da internaciaj geedziĝoj per Esperanto kiel la ĵus bakita paro, ges-roj Goliĉ (foto: la edzo el Jugoslavio kaj la edzino el la insulo Maŭricio en la Hinda Oceano), donas firman bazon al la ĉiutaga uzado de la Internacia Lingvo.



SUPERNACIA KONCEPTADO EKDE INFANAĜO



Denaskaj esperantling

El 55 familioj respondis al la enketo 31, el kiuj 1 havas ne "denaskajn" sed "de-geknabaĝajn" esperantlingvulojn. Do, validaj estas 30 respondoj, el kiuj 5 estas de familioj kun internacia geedzeco.


Patro Esperante, patrino nacilingve

Montriĝis, ke inter diversaj metodoj denaske lernigi Esperanton la plej populara estas uzi Esperanton kaj nacian lingvon paralele en la familio. La nacia lingvo — ja vere — estas la "patrina" lingvo.

23 familioj havas paralelismen de ambaŭ lingvoj. En 14 familioj el ili la patro parolas nur Esperante kaj la patrino propralingve. Ŝi, eĉ loĝante en fremda lando pro internacia geedziĝo, parolas hejme la lingvon de sia naskiĝloko, ne tre utilan por la ĉiutaga vivo de la infanoj. Kaj krome estas mirinde, ke neniuj familioj havas inversan metodon "Patro nacilingve, patrino Esperante".

Dum ĉiuj 5 internaciaj geedzaj paroj aplikas nur tiun paralelan dulingvismon, la samnacilingvaj paroj havas diversajn metodojn krom la menciitan. Ekzemple:

- Nur Esperante.
- Komence nur Esperante, poste en ambaŭ lingvoj.



- Esperante, nur kiam esperantlingvaj gastoj kun-estas; ĝenerale nacilingve.
- En ambaŭ lingvoj aparte po duontage.
- Komence en ambaŭ lingvoj; poste Esperante nur kun esperantlingvaj gastoj.

Koktelo de lingvoj — ne malofta

Kiaj diferencoj ekzistas en la rezultoj de tiuj metodoj? En rilato kun la nacilingvo, la infanoj vartitaj hejme nur per Esperanto malofte miksas ambaŭ lingvojn. Kontraste la infanoj en tri-lingva medio (patro Esperante, patrino en la lingvo de sia naskiĝlando, la aliaj ekstere en la lingvo de la lando apartenata de la infanoj) “terure” miksas la tri lingvojn.

El la 30 familioj 18 respondis, ke iliaj infanoj iugrade miksas la lingvojn, kaj 12 asertis, ke la infanoj neniam miksis ilin.

Valoraj avantaĝoj kaj etaj malavantaĝoj

Kiaj avantaĝoj aŭ malavantaĝoj troviĝas ĉe la infanoj parolantaj Esperanton kompare kun aliaj infanoj edukataj nur nacilingve?

Al tiu demando la enketitoj libere nomis avantaĝojn kaj malavantaĝojn jene:

(A= gepatroj samnacilingvaj; B= gepatroj internaciaj)

Avantaĝoj	A	B	Sumo
supernacia koncepto	13	4	17
ĝuo en internaciaj kontaktoj	13	2	15
facila lernado de nacilingvo(j)	8	2	10
kresko de intelekto/vidkampo	7	2	9
posedo de memfido	4		4
utiligo kiel sekreta lingvo	2	1	3
pli intensa ligiĝo de familianoj	3		3
aliaj	3		3

Malavantaĝoj	A	B	Sumo
mensa streĉo gepatra pri edukado	5		5
nefavoro de parencoj, gastoj	4		4
nebona lernado de nacilingvo(j)	1	1	2
neinteresiĝo al naciaj kulturoj	2		2
malestimo de samklasanoj	1	1	2
devo ŝanĝi lingvon por fremduloj	1		1

Verŝajne ne estas hazarde, ke 17 el la 30 familioj nomis avantaĝa la supernacian konceptadon de la denaskaj esperantlingvuloj. “La infanoj psike pretas interkompreniĝi kun alilandanoj kaj ankaŭ scipovas tion atingi”, klare skribis unu enketito. Se ni aldonas ankaŭ la 9 voĉojn por “kresko de intelekto kaj vidkampo”, efektive 26 familioj (86,7%) opinias, ke la kono de la Internacia Lingvo donas larĝan vidkampon, kiu igas la parolantojn koncepti supernacie.

Interesa komparo en la tabeloj estas inter avantaĝa “posedo de memfido” kaj malavantaĝa “malestimo de samklasanoj”. Al enketa demando “Ĉu la infanoj embarasiĝis pro kono de Esperanto, estante inter siaj amiketoj ne-esperantlingvaj?” respondis 5 familioj jese kaj 22 nee.

Eĉ infano, kiu foje plendis al la gepatroj “Neniu el la samklasanoj havas tiel strangajn gepatrojn kiel mi”, ŝanĝas la opinion kun la tempopaso kaj post akiro de diversaj avantaĝoj kaj finfine akiras memfidon tiel, ke li aŭ ŝi post adoleskiĝo dankas la gepatrojn pro ilia donaco de la bona komprenilo. Tion mem spertis la gepatroj, kiuj havas jam kreskintajn infanojn, dum junaj gepatroj kelkfoje renkontas reziston aŭ embarasiĝon de la infanoj.

La unuavica malavantaĝo “mensa streĉiĝo de la gepatroj pri edukado” supozeble estas propraĵo de samnacilingvaj gepatroj. Ĉar ĝenerale la internaciaj geedzaj paroj nature uzas la Internacian Lingvon kiel ĉiutagan lingvon kaj posedas ĝin kiel la solan komprenilon komunan inter si, por ili ekzistas preskaŭ neniom da mensa streĉiĝo rilate al la hejma uzado de la lingvo.

Sed al la demando “Ĉu la internacieco de la geedziĝo estas grava faktoro por esperantlingvigo de infanoj?”, 6 samnacilingvaj paroj respondis nee, 1 jese, kaj 1 diris “Povas esti” kaj la ceteraj samnacilingvaj donis nenian respondon. El la 5 internaciaj paroj 2 respondis jese, 2 nee kaj 1 “Povas esti”.

Ŝajnas, ke la internacia geedziĝo ne havas decidan rolon tiurilate, se la gepatroj bone regas Esperanton

SUPERNACIA KONCEPTADO EKDE INFANAĜO

(daŭrigo de p. 87)

kiel ĉiutagan lingvon kaj posedas vastan vortotrezoron por ne heziti en ordinaraĵoj konversacioj. Ne multaj "patroj" mense streĉas sin pro la ne tre bona regado de Esperanto flanke de la "patrinoj", kaj inter ili ekestas ankaŭ "disputetoj".

"Infankongreseto" dezirata

28 familioj el 30 opinias internaciajn infankongresetojn dezirindaj. Pluraj el ili tre bedaŭras, ke ili loĝas tro fore de la kongreslandoj. Unu opinias, ke la utilo de partopreno al infankongresetoj dependas de la karakteroj de la infanoj.

La infanoj foje partoprenintaj internacian infankongreseton ĝenerale fariĝas pli fervoraj en la uzado de la Internacia Lingvo pro sia propra sperto pri ĝia utilo. Sed tio ne signifas, ke ili fariĝas entuziasmaj ankaŭ por la movado; pri tio pluraj gepatroj plendas. Por la infanoj, kiuj denaske akceptis Esperanton kiel vivantan lingvon kaj kiel naturan komunikilon, uzi la lingvon mem estas la ĉefa intereso sed ne movadi por ĝi, same kiel ili ne faras ian movadon por sia nacia lingvo.

Ne multaj personoj opinias, ĉu tial aŭ ĉu pro alia kialo, necesa ian organizaĵon de la gepatroj de denaskaj esperantlingvuloj. Dum 12 familioj opinias ĝin necesa, 7 opinias ne necesa kaj 9 neentuziasme opinias "eble helpa".

Pli da belaj libroj kaj gazetoj por infanoj

Antaŭ kelke da jaroj malaperis la gazeto *Gepatra bulteno* eldonita por la gepatroj de denaskaj esperantlingvuloj kaj subvenciita de UEA. Unu el la ĉefaj kaŭzoj de ĝia malapero estis manko de kontribuantoj.

El la enketo montriĝis, ke multaj familioj deziregas havi belajn fabellibrojn, legolibrojn kaj gazetojn por infanoj. La malaperinta *Gepatra bulteno* fakte ne estis tre "belaspekta", kio estas fatala por la infanoj, kiuj al ĉiam pli belaj infanaĵoj kutimiĝas.

Ĝuste pro tio, la nove ekaperinta gazeto *Juna amiko* (vd. *Esperanto*, 1973, p. 34) estas akceptata de multe da soifantaj manoj. La tavolo satiĝonta per ĝi tamen estas infanoj de 12-16 jaroj. Por la malpli aĝaj infanoj io ankoraŭ devas esti farita.

Por la infanoj, kiuj denaske akceptas Esperanton kiel naturan fenomenon, fanatikeco de la gepatroj estas io ne natura, al kio ili rezistas. Same, la gazetoj por tiaj infanoj devas esti tute ordinaraĵoj sen ligo kun la movado. La graveco zorgi la denaskajn esperantlingvulojn (kaj ankaŭ la de-geknabaĝajn Esperanto-parolantojn) per ĉiuj eblaj rimedoj estas mem-evidenta kaj esenca por la evoluo de la Internacia Lingvo.

Ĉu la pruvoj, ke Esperanto estas instruebla ankaŭ al bebo kaj ke la denaska esperantlingvulo akiras vastan vidkampon supernaciecan, ne donas indon al la lingvo por ĝia disvastiĝo?

Bedaŭrinde ekzistas malmulte da homoj en la mondo, kiuj scias eĉ iom pri tiuj faktoj. Kiom el la ceteraj konvinkiĝus pri la valoro de la Internacia Lingvo, se ili aŭdus nur pri tiuj faktoj!

Akiko Woessink-Nagata

Ekde marto funkcias ĉiusabate infanvartejo por denaskaj esperantlingvuloj de malpli-ol-6 jaroj, en la oficejo de Hungara Esperanto-Asocio. La unuan kunvenon partoprenis 12 infanoj, kiuj ludis kaj babiladis Esperante sub bona gvidado de du lingve kaj fake spertaj sinjorinoj.




PRAKTIKO EN LA HEJMO

Ekzistas branĉo en nia movado, pri kiu zorgas nur tre malmultaj esperantistoj: la esperantistigo de infanoj. Kaj tamen tio estas la plej fruktodona grundo por niaj semoj.

Neniam en la vivo oni lernas lingvon tiel facile, kiel en la frua infanaĝo. Tion oni povas observi bone en lando kun multe da enmigrintoj. La infanoj el iliaj familioj pli frue ekkomprenas kaj ankaŭ ekuzas la lingvon de la enmigrita lando, ol la gepatroj, kiuj lernas ĝin en kursoj aŭ per libroj, dum la infanoj sole aŭdas ĝin. Mi jam ofte observis tiajn infanojn de kvin eĉ kvar jaroj interpretantajn ion inter la gepatroj kaj indiĝenoj.

Kial do nur malmulte da esperantistoj-gepatroj parolas Esperanton kun siaj infanoj? Ne estas absolute



La familio Haazen en Antverpeno (Belgujo) parolas hejme nur en Esperanto, escepte de kiam ĉeestas gastoj kaj parencoj, kiuj ne scias ĝin. "Amo kaj atento inter la gepatroj tre gravas, same kiel tiuj al la infanoj. Tio prizorgas firman bazon por ĉio...", tiel opinias gesinjoroj Haazen.

necese, ke oni faru tion jam ekde la naskiĝo de la infano.

Mi komencis ekzemple kun mia filo paroli en Esperanto, kiam li estis trijara kaj jam parolis korekte la gepatran lingvon. Pro siaj jam granda vortotrezoro kaj kreskanta lingvosento, li parolis ambaŭ lingvojn same nature. Sed oni neniam permesu, ke la infano uzu galimacion el du lingvoj, sed postulu, ke ĝi parolu korekte unu aŭ la alian!

Ĉiu loka grupo devus zorgi ne sole pri la esperantistigo de multaj gejunuloj kaj formi specialan junular-



Fraŭlineto Destina Tyblewska en Jelenia Góra (Pollando) de tempo al tempo babilas ĉefe kun la patro en Esperanto kaj legas interesajn librojn skribitajn en ĝi.

grupon sed ankaŭ fondi porinfanan sektion, en kiu oni parolu kaj ludu kun infanoj, uzante *neniam* alian lingvon ol Esperanto. Se eble, la infanoj eĉ pensu, ke la gvidantoj ne scipovas ilian gepatran lingvon.

□ □ □ □ □

Ekde antaŭ 3 semajnoj mi kelkfoje "laboras" kun 5 knabinoj inter 6 kaj 12 jaroj, filinoj de laboristoj en ĉi-tiea bieno. Metinte multajn objektojn en mia loĝoĉambro, mi nature kunludas per simplaj demandoj: "Ĉu ĝi estas el papero? Ĉu ĝi estas bruna?" Alian fojon ni ĉiuj desegnas vireton kaj diras laŭte la nomon de la korpoparto, kiun ni ĵus desegnis. Ni firmigas la novajn vortojn uzante ilin en demandoj: "Ĉu vi jam desegnis la nazon?", "Ĉu vi havas kvin nazojn?" Kaj kiam venas erara "jes", mi tuj uzas la okazon por nomi aliajn kapopartojn: "Mia Dita havas la duan nazon sur la frunto, la trian sur la mentono..."

Kelkfoje ni alrigardas bildojn. "Kion vi jam konas sur ĉi tiu bildo?" Kiam la knabinoj renkontas nekonatajn vortojn kaj nomas ilin nacilingve, ili rimarkas, ke mi respondas nur al Esperantaj demandoj. Se la demandita objekto estas ekzemple dometo, mi tuj uzas la okazon: (montrante grandan domon) "Ĉu tio estas ankaŭ dometo? Ne. Vidu, domo estas granda, dometo estas malgranda. Tio estas arbo, sed ĉi tio estas arbeto..." Senkonscie, la knabinoj sente konatiĝas kun la sufikso. Post kelkaj monatoj ili scios nenion pri la gramatiko sed havos bonan lingvosenton.

□ □ □ □ □

Al mia filo mi instruis la gramatikon en malmultaj tagoj ĝuste pro ĝia senescepteco, antaŭ ol li venis en gimnazion. Kaj poste la kono de Esperanto helpis al li en la lernado de la latina lingvo ne sole pro ĝia internacia vortotrezoro sed ankaŭ pro ĝia logika gramatiko.

La granda valoro de Esperanto en edukado de infanoj estas ofte neglektata. Necesas akcenti ankaŭ tiun flankon de la movadoj tutmonda kaj loka.

Erika Linz, Brazilo

ERIKA
LINZ

SEPA KONTINENTO



La ideon donis la filmo "Sepa Kontinento" (Sedmi kontinent), kiun reĝisoris kaj filmigis Dušan Vukotić, laŭ la filmnovelo de Ruĵeva Fišerova (Ĉeĥoslovakujo). En tiu filmo estas donita vizio de nova mondo, en kiu infanoj, reprezentantoj de blanka, flava kaj negra raso, trovas neloĝatan insulon kaj en naturo, ne ŝargita de hodiaŭa civilizo, organizas vivon en reciprokaj amikeco kaj amo. La infanoj forkuris el la mondo de plenaĝuloj serĉante pli belan kaj pli noblan mondon. Ne trovinte tian mondon en teknike ĝis maksimumo progresinta sed senhumanigita socio, ili foriras al "sia kontinento" por tie krei mondon, en kiu ili vivos pli feliĉe.

Tian infanvizion decidis realigi al esperantistoj vizitantaj Primoštenon jam bone konata urbo Ŝibenik, kiu per firmiĝinta "Festivalo de infano" jam evoluas al la rekonita "infana metropolo". Ni utiligu la okazon por informi, ke ankaŭ ĉi-jare okazos en tiu urbo (jam la 13a) Jugoslavia Infanfestivalo de la 23a de junio ĝis la 3a de julio, kaj, ke en la manifestacia parto de la festivalo partoprenos la plej elstaraj infanoj kaj junularaj teatroj el la lando kaj la mondo.

Internacia kunlaboro

La ideo provi realigi la vizion de Sepa Kontinento sur unu insulo de la Ŝibenika insularo estis prezentita en julio 1968, post prezentado de la menciita filmo dum la naŭa Infanfestivalo. Post multflankaj antaŭpreparoj la Konsilantaro de komunumo Ŝibenik en kunsido de 1970-02-07 decidis, ke neloĝata insulo Kakan, troviĝanta 16 kilometrojn de la urbo Ŝibenik, longa 5000 m., larĝa 100-1000 m., parte arbarumita, estu donacita por realigo de la ideo pri Sepa Kontinento. Post tiu decido estas elektita agadkomitato por la realigo de tiu ideo. Multaj unuopuloj, institucioj kaj organizaĵoj estis informitaj pri tiu ideo kaj pri ebloj por ĝia realigo. Tiamaniere la ideo eniris en la vasta publikon kaj estis akceptita kun aprobo. Ĉar la ideo disvastiĝis kaj ricevis daŭre pli grandan nombron da simpatiantoj, en Ŝibenik fondiĝis je 1970-06-13 la jugoslavia komitato por realigo de la ideo de Sepa Kontinento, kiun eniris ankaŭ la Nobel-

premiito Ivo Andrić kaj pli ol dudeko da elstaraj personoj el jugoslavia kultura kaj politika vivoj. Laŭ la decido de la Komitato estis sendita letero al la ĝenerala sekretario de UN, al kiu respondis la direktoro de Kabineto de la ĝen. sekr. s-ro Robert G. Miller, esprimante kontenton kaj feliĉon pro tia ideo. Post tio la ideo komenciĝis disvastiĝi kiel movado inter la infanoj kaj plenaĝuloj tra la tuta mondo. Estas fondita granda nombro da kluboj de Sepa Kontinento en elementaj lernejoj, kiuj organizas aron da manifestaĵoj. Alvenis multnombraj leteroj el multaj landoj. La urbon kaj la insulon vizitis aro da elstaraj personecoj, inter kiuj ni menciis nur s-ron Bam Arvind, konstantan reprezentanton de UN, s-ron Birger Halden, la direktoron de Informcentro de UN por Albanio kaj Jugoslavio, s-inon Josephine Baker, kiu post sia vizito de la insulo en oktobro 1971 estis entuziasmigita kaj volonte akceptis esti ambasadoro de tiu ideo.

Ankaŭ la aliaj helpis la ideon alimaniere. Ekz. firma "Standard" el Oslo, okaze de metado de submara kablo por elektrumigo de najbaraj insuloj Kaprije kaj Ĵirje, kiam estis konsiderata la kablo ankaŭ por la insulo Kakan, donacis parton de la kablo ĝis Kakan (1400 m.) kaj senpage metis ĝin. Alvenis ankaŭ deklaro de Kacumi Nage de Grupo por Abolo de Atomarmiloj, Inĝeniera Kolegio de Universitato Hosei en Tokio por senpaga ellaboro de arkitektprojekto por la tuta teritorio de Sepa Kontinento.

La faka ellaboro pri ideoj, programaj kaj priterenaj konceptoj de Sepa Kontinento estas komisiita al Centro por Eksterlerneja Eduko, kies sidejo estas en Zagrebo. Nun oni laboras sur du reloj: unue, je antaŭpreparoj por fizika realigo de Sepa Kontinento; due, disvastigo de la ideo kiel movado. La pasintaj jaroj prezentis la unuan fazon en la realigado de la ideo, t.e. fazon de firmiĝo de la ideo kaj kreado de favora klimato. Dank'al Jugoslavia Radio kaj Televido kaj la tuta gazetaro, precipe de porinfana (en kiu aperis miloj da artikoloj) ĝis nun estas atingitaj tre bonaj rezultoj.

Nun sekvas la dua fazo de farendo: trankvila, studema kaj tute respondeca laboro. La ideo de Sepa Kontinento estas longedaŭra projekto, kiu ne dependas de monato aŭ jaro. Kaj je la fino ni starigas demandon: ĉu la afero fariĝu ankaŭ nia afero?


Nepre jes, kaj jen kial: la celoj de Infanfestivalo kaj Sepa Kontinento estas parencaj al la ideoj, por kiuj laboras ni esperantistoj. Sekve ankaŭ ni povus kontribui al la noblaj ideoj ankaŭ per enkonduko de Esperanto en la festivalon kaj la internacian "infanŝtaton."

Rade Petković, Jugoslavio

Noto de la redakcio


Laŭ alia fonto de la novaĵo pri la Sepa Kontinento, la insulo Kakan estas donacita al Unuiĝintaj Nacioj por ĝia dispono kaj enhavos kvartalojn kun diversaj naciaj stiloj de la arkitekturo por la dispono de la infanoj de la tuta mondo sendepende de la raso, nacieco kaj religio, — infanoj de malpli-ol-18 jaroj. Sur la bazo de la egalrajteco de ĉiuj lingvoj, kiel la ĉefa komunikilo la uzo de Esperanto estas konsiderata.

RADE
PETKOVIĆ



Stimula provo por fakuloj

False akuzita



Recenzas William Auld (Skotlando):

Okupacio, de Erni Krusten. El la estona trad. Hillar Saha. Tallinn (Estona SSR): Eesti Raamat, 1972. 70 p. 17 cm.

Tiu ĉi nova novelo el Estona SSR estas profunda kaj atentokapta historio pri Kalle Paggi, false akuzita kaj mortkondamnita pro "signalado al malamikaj aviadiloj", kiu fakte ne okazis. La historion oni ekkonas laŭ la vidpunkto de diversaj rolantoj en implikitaj interrilatoj, kaj nur en la fino la leganto ekscias la motivon de la falsa akuzo, kaj ĉio cetera falas en sian ĝustan lokon.

La majstra talento de la aŭtoro scias pentri tre realajn figurojn, kaj samtempe ampleksan bildon pri la vivo en okupata lando. Aldonu al tio la fakton, ke ankaŭ la tradukinto faris bonege sian laboron — el vidpunkto de la Esperanta stilo — kaj jen ni havas belan libreton, indan ornamaĵon de ĉi tiu nova serio el Estonujo. Tre leginda.

Mendu ĉe UEA: 2,16 gld. (por Nederlando 2,25 gld.) plus sendokostoj 10%.

Recenzas E. J. Lieberman (Usono):

Farmakologio por malbonuzoj de medikamentoj, de Tadokoro S. Liège (Belgujo): Someraj Universitataj Kursoj, 1972. 15 p. 27 cm.

La aŭtoro, japana kuracisto, prezentas superrigardon de grava mondskala problemo, kun utila tabelo de danĝeraj drogoj kaj interesa originala esploro pri simioj sub diversaj kondiĉoj. Sed la broŝuro ne sufiĉe helpas aŭ fakan aŭ laikan dialogon, pro iom arbitra terminaro kaj lingvaj eraroj. Prave uziĝas *dependeco* kaj *tolereco*, malprave *fiziko* kaj *animo*, kaj tute mankas *drogo*. Troviĝas neologismoj: adikcio, habituado, psikotropa, kannabiso, sed mankas tiaj vortoj rekoneblaj, kiel drogomanio (aŭ drogismo, laŭ la formoj alkoholismo kaj morfinismo), al kutimigo, psikefika, kanabo. Ni zorge pravigu novajn terminojn, ekzemple per klarigo kaj por klarigo de la trouzo, misuzo kaj bonuzo de medikamentoj kaj aliaj substancoj, inkluzive de alkoholo, tabako kaj mangaĵoj. Malgraŭ interesa enhavo, la verketo, malbone redaktita kaj presita, valoras ĉefe al la fakulo kiel provaĵo stimula.

Mendu ĉe UEA: 4,80 gld. (por Nederlando 5,— gld.) plus sendokostoj 10%.

LASTE APERIS...

Bahá'í: La mondkredo por la nuntempa homaro Arthur L. Dahl. El la angla tr. Roan Orloff Stone (1972). 22p. 22 x 9 cm. 1,26 gld. Celoj, historio, instruoj kaj administra sistemo de bahaismo.

Bazaj nocioj de biologio (1972) C. Støp-Bowitz. 115p. ilus. 30 cm. 26,70 gld. (Someraj Universitataj Kursoj 1972). Kursoteksto.

Behövs det fler språk när det redan finns tretusen? (1973) 8p. 21cm. 0,42 gld. Modernaspekta sveda informilo sub la titolo "Ĉu necesas plia lingvo, kiam jam ekzistas tri mil?"

Dezasseis conceitos da língua internacional (1971) Adolfo Nunes. 21p. 24cm. Teksto de portugallingva parolado pri "Dek ses konceptoj pri la internacia lingvo".

Esperanto-bulgara konversacilibro (2a eld. 1972) Iv. Sarafov. 147p. 16cm. 2,82 gld. Praktika frazaro por turistoj en Bulgarujo.

Espírito de Zamenhof, O (1971) Adolfo Nunes. 7p. 24cm. 0,90 gld. Teksto de portugallingva parolado pri la Esperanto-movado, precipe en Portugalujo.

Geologio internacia, volume 2 (1972) 144p. 21cm. ilus. 4,80 gld. Naŭ studoj geologiaj originale verkitaj en Esperanto de diverslandaj aŭtoroj.

Je parle Esperanto (1972) Jean Thierry. 160p. ilus. 12cm. 3,60 gld. (Serio Marabout-Flash n-ro 345). Ĉi tiu konciza kurso por franclingvanoj, kun amuzaj desegnaĵoj, celas instrui senpene la bazan gramatikon kaj utilan ĉiutagan frazaron al "tiuj, kiuj ne havas tempon".

Krimo de l' milito, La (eseo) (orig. 1934). Juan Bautista Alberdi (1810-1884). El la hispana tr. E. de Bonaero (1973). 212p. 15cm. 12,72 gld. Argentina verko pri politikaj, historiaj, juraj kaj filozofiaj aspektoj de milito.

Margaret Hill kantas britajn popol-kantojn* kun gitaro. (1972) Aranĝis Margaret Hill. Tr. William Auld. Disko duflanka, monofona. 17cm. 33 t/m. 9,— gld. (CSA 107). Ses kantoj el la libro *Floroj sen kompar'.*

Militirado norden kaj suden (1972) 170p. 13 x 19 cm. 1,08 gld. Bildrakonto laŭ samnoma filmo pri bataloj en 1947 en la ĉina revolucia milito.

Ne plu ludo . . . kaj aliaj noveloj (1927-1947). N. Barthelmess (1897-). 127p. 17cm. 5,76 gld. Kvin originalaj noveloj de konata sennaciista aŭtoro: 2 jam antaŭe eldonitaj (*Diablidoj* kaj *Milito kaj paco*) kaj 3 aliaj el la jaroj ĉirkaŭ la Dua Monda Milito, kun tiurilataj temoj.

Observejo 3 52p. 19cm. 0,72 gld. Kolorpresita bildrakonto pri infanoj, kiuj kaŝobservas japanajn trupojn dum la rezistmilito en Ĉinujo.

Poŝtkartoj "La irigacia kanalo Ruĝa Flago" Serio de 12 bildkartoj pri grava 1500-kilometra kanalo en la regiono de Tajhangmontaro, Ĉina Popola Respubliko. Unu serio 0,72 gld.

Poŝtkartoj "Pejzaĝoj de Pekino" Serio de 12 bildkartoj kun koncizaj klarigoj. Unu serio 0,72 gld.


Poŝtkartoj "Ŝaŭŝan" Serio de 12 bildkartoj pri la hejmloko de Maŭ zedong. Unu serio 0,72 gld.

Sonato '72: hajkaro (1972) Hajkista Klubo, Oosaka. 44p. 18cm. 1,32 gld. Originalaj poemoj de Miyamoto masao, Tanaka sadami, Tomita tomu, Ueyama masao.

Voĉoj de prof. d-ro K. Kalocsay Disko duflanka, monofona, fleksebla. 18cm. 33 t/m. 2,22 gld. (La voĉalbumo de Esperanto, n-roj 11-12). Sen teksto.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

LOKE — FAKE



Dum la Semajno de Internacia Amikeco 1973
flirtis Esperanta standardo apud la usona ekster la hotelo
Allerton ĉe Michigan Avenue en Ĉikago.

FAKE

Politiko

- Laŭ Radio Roma, la ĝenerala sekretario de Socialisma Internacio certigis, ke li metas la proponon de Itala Socialdemokrata Partio pri solvo de la lingva problemo en la tagordon de unu el la venontaj kunvenoj de la Internacio. En tiu okazo, la itala reprezentanto subtenos la adopton de Esperanto por pli facila komunikado de la socialismaj organizaĵoj el diversaj landoj.

Skoltoj

- En la skolta montara kabano apud Bregenz (Aŭstrujo) okazos 10-taga kunveno (1973-07-03 ĝis -13) organizata de Skolta Esperanto-Ligo. Bonvenaj estas ankaŭ la skoltoj, kiuj antaŭ nelonge eklernis la Internacian Lingvon. La restado 10-taga kostos inkluzive de manĝoj kaj ekskursoj nur 125 guldenojn. Adreso de la sekretario de SEL: Taxusstraat 7, Zaan- dam, Nederlando.

Tendumado

- La Asocio "La Amikoj de Junuloj" (*Les Amis des Jeunes*; sidejo: 11 rue Langevin, F-13200 Arles, Francujo, apud Marseille) organizas tendumadon por internaciaj renkontiĝoj kaj ripozoj en la regiono de Cevenoj (Cévennes). Ĝi okazos de la 20a de julio ĝis la 25a de aŭgusto ĉi-jare. La organizantoj de la Asocio, mem eklerninte Esperanton, atendas partoprenon de Esperanto-parolantoj.

LETEROJ DE LEGANTOJ



zenti Esperanton kiel la duan lingvon por aviado — al Internacia Aer-Transporta Asocio (IATA). Pro sia relative facila lernebleco, ĝi devus esti uzata kiel "lingvo en kazo de danĝero", kiam la du aviadilestroj kaj la flughavena direktistaro ne komprenas unu la alian per la angla lingvo. Necesus prezenti al IATA liston de aviadterminoj, bone preparitan de fakuloj. Kvankam Esperanto estus laŭ tiu metodo duavica post la angla, povus okazi, ke post ĝia enkondukiĝo aviadistoj trovus ĝin pli facila, ol la anglan, kaj paŝo post paŝo prenus ĝin kiel unuavican komunikilon.

Respondas la redakcio:

Trafa propono — kondiĉe, ke troviĝu la necesaj fakuloj esperantlingvaj por prepari tian iniciaton. Eble estus jam tempo, ke la aviadfakuloj inter niaj membroj organiziĝu tiucele . . .

Skribas Robert Kvašňák (F.R. Germanujo):

Por solvi la lingvajn malfacilaĵojn jam ekzistantajn ĉe la aviadistoj en la lingvo "flugangla", oni povus pre-

— PERSONE

LOKE

Danlando

- Centra Dana Esperantista Ligo atingis jam 198 subskribojn de eksaj kaj nunaj ministroj kaj parlamentanoj sub la konata Propono de UEA al Unuiĝintaj Nacioj, prezentita en 1966. Tiu nombro inkluzivas la duonon de la nuna parlamento kaj duonon de la nuna registaro.

F.R. Germanujo

- Denove komenciĝis en aprilo Esperanto-informado kaj -lingvokurso en la lingvistika fakso de la Universitato de Hamburgo. La instrukomisiito estas d-ro Werner Bormann, kiel antaŭe.

Kuvajto

- Radio Kuvajto elsendis prelegon pri la Internacia Lingvo kaj Zamenhof en la 6a de marto en la araba lingvo. En apudaj landoj kiel Irako oni povis aŭdi la elsendon.

PERSONE

Setälä

- La Filozofia Fakultato de la Universitato de Helsinki aljuĝis al magistro Vilho Setälä (Finnlando) honoran doktorecon filozofian. Lia uzo de Esperanto por kompara lingvistiko prezentis gravan parton inter la meritoj, kiuj kaŭzis la honorigon.

Allogaj plurkoloraj prospektoj en Esperanto reklamas la varojn de la motocikla fabriko en Považská Bystrica, Ĉeĥoslovakujo. La prospektoj estas riceveblaj por interesitoj pri motocikloj per la adreso: Mašinfabrika, OTS, CS-017 34 Považská Bystrica, Ĉeĥoslovakujo.



NEKROLOGOJ

LUCIEN LAURAT


Konata de UK-kongresanoj kiel preleginto en pluraj Internaciaj Someraj Universitatoj, Lucien Laurat forpasis antaŭ nelonge. Eksprofesoro pri politika ekonomio de la Universitato de la Orientaj Popoloj en Moskvo (1923-1927) kaj de Laborista Supera Instituto en Parizo (1932-1939), li aktivis ĉefe en Sennacieca Asocio Tutmonda per artikoloj kaj prelegoj.

EVERLEIGH M. PRESTON (1899-1973)


La 83-jara vicdelegito en Bristol (Britujo), Everleigh M. Preston, mortis en 1973-01-17. Krom havi funkcion en Brita Esperantista Asocio, li estis dum pli ol trideko da jaroj membro de UEA ĝis la morto.

Lucien
Laurat





LERNEJA BULTENO



N-ro 26 — Redaktoro: U. J. Moritz, Blumenstr. 7, D-511 Alsdorf, F. R. Germanujo

Britujo

La raporto de la Asocio de Esperantistaj Instruistoj de Britujo koncerne la jaron 1972 spegulas la konsiderindan aktivecon de tiu landa sekcio de ILEI. La ĉefa agado estis la distribuado de publika letero de Raif Markarian, lernejestro, pri la eduka valoro de Esperanto. Tiun dokumenton ricevis la plejparto de la estroj de duagrada lernejoj en la tuta Britujo, la direktoroj de porinstruistaj seminarioj, la lokaj edukaj instancoj kaj la pedagogiaj revuoj. Konstante venadas ankoraŭ informpetoj; oni ankaŭ deziras ricevi prov-ekzemplerojn de lernolibroj. La membronombro de la Asocio restis ĉe 180. Okazis diversaj porinstruistaj kursoj.

Bulgarujo

Laŭ raporto de la prezidanto de la instruista sekcio de Bulgara Esperanto-Asocio, s-ro Vasil Bozarov, de pluraj jaroj oni instruas la Internacian Lingvon en proksimume 100 lernejoj de la tuta lando. Tiu instruado tuŝas proksimume 2500 infanojn. La sekcio senlace pligrandigas la nombron de Esperanto-instruistoj, kiujn — post la adekvataj ekzamenoj — ŝtata diplomo rajtigas instrui la lingvon. Dum la pasintaj 4 jaroj preskaŭ 600 instruistoj partoprenis korespondajn kursojn pri Esperanto, kaj granda sukceso estis ankaŭ la 20-tagaj someraj kursoj, kiujn ĝis nun ĉeestis jam

pli ol 300 personoj. La sinteno de la kleriga ministerio estas senŝanĝe favora.

F.R. Germanujo

En la nova universitato (fandita el diversaj altlernejoj) de Paderborn (Nordrejn-Vestfalio) okazis, de la 3a ĝis la 8a de januaro 1973, lingvolaboratoria kurso, kiun ĉeestis 20 personoj, inter kiuj estis 15 geinstruistoj kaj studentoj. Oni laboris surbaze de la programita Esperanto-kurso de H. Behrmann. Ne nur la lernado estis sukcesa, sed ankaŭ el informa vidpunkto la kurso estis tre pozitiva: krom diversaj gazetaj artikoloj ankaŭ 10-minuta televida raporto (elsendita en la 3a, okcidentgermana, programo) komplete objektivite traktis la Internacian Lingvon kaj ĝian pozicion en diversaj landoj kaj precipe en instruaj medioj. Parolis tiuprograme ankaŭ TEJO-estrarano Senad Ĉolic en Esperanto.

Same surbaze de la Behrmann-kurso "Esperanto programita" estis aranĝita lingvolaboratoria semajnfino la 10an kaj 11an de februaro 1973 en la urbeto Gronau (Nordrejn-Vestfalio) tuj apud la nederlanda-germana limo. Partoprenis preskaŭ 40 personoj el Nederlando kaj F.R. Germanujo. La mallonga, sed intensa studado estis financita de la distrikta administracio de Münster. La urbestro de Gronau aranĝis agrablan akcepton por la ĉeestantoj, kaj la najbara

Jen parto de la gelernantoj en la elementa lernejo "Oltresavio" de Cesena, Italujo. Maldekstre ilia instruistino s-ino Taddei. (Vidu ĉe "Italujo".)



urbo Hengelo (Nederlando) skribis en speciala saluto, ke ĝi bonvenigas tiajn manifestaciojn, kiuj helpas forigi la limojn inter la popoloj.

Italujo

Depost oktobro 1972 funkcias regula instruado de la Internacia Lingvo en 14 klasoj (tria, kvara kaj kvina lernojaroj) kun sume 330 gelernantoj. Okazas ĉiusemajne 1 leciono por ĉiu lernanto. Ĉio ĉi efektiviĝas en la elementa lernejo "Oltresavio" de la urbo Cesena. La Esperanto-instruistino, s-ino Franca Taddei, estas salajrata por tiuj lecionoj same kiel por aliafakaj.

Jugoslavio

La Ministerio por Kulturo kaj Klerigo de Slovenujo oficiale invitis ĉiujn instruistojn kunlaborantajn en la 5-landa eksperimento al la 7a Kunordiga Konferenco, kiu okazos de la 18a ĝis la 20a de julio 1973 en Maribor.

Tiun konferencon sekvos (ĝis la 26a de julio) la Internacia Instruista Konferenco de ILEI, samloke. Kroatia Esperanto-Ligo (Amruševa 5/I, YU-41001 Zagreb) organizos denove Esperanto-seminaron, precipe por geinstruistoj, de la 5a ĝis la 22a de julio 1973 en la konata somerumejo Primošten. Oni havos kursojn por komencantoj kaj progresintoj; fine de la kursoj estos ebleco por ekzamenoj.

Pollando

De oktobro ĝis decembro 1972 restadis en Pollando s-ro Jordan Angelov el Bulgarujo. Li estas instruisto pri literaturo kaj Esperanto. Li gvidis diversajn kursojn en Gdańsk, interalie por instruistoj. Krome li vizitadis multajn urbojn tra la tuta Pollando kaj faris amason da prelegoj, ankaŭ kun diapozitivoj, pri Bulgarujo. Miloj da gelernantoj kaj plenkreskuloj aŭskultis lin kaj konstatis la taŭgecon de Esperanto.

UK Beogrado

Grava informo por la kongresanoj

Ekzistas plano aranĝi komunan vojaĝon (per aŭtobusoj aŭ per vagonaro) de Beograd al Ateno por la partoprenantoj de la Oficiala Postkongreso (1973-08-05 ĝis -12). Bedaŭrinde detaloj pri tio estos anoncblaj nur pli poste, ĉar ankoraŭ daŭras la koncernaj traktadoj inter la greka kaj la jugoslava vojaĝagentejoj. Ĉiuj aliĝintoj al la Postkongreso ricevos siatempe la koncernajn informojn.

Dumkongresa libroservo

Komisiite de la LKK, Serbia Esperanto-Ligo organizos oficialan librostandon en la kongresejo Dom Sindikata. Esperanto-eldonejoj kaj aliaj interesitoj estas petataj kontakti al: SEL, Terazije 42, YU-11000 Beograd, Jugoslavio, antaŭ la 31a de majo 1973.

Statistiko

Je la 13a de aprilo 1973 aliĝis al la kongreso 1083 personoj el 37 landoj.

ESPERANTO EN RADIO

Aperis

"Radioamatora

Esperanto-Terminaro",

angla-Esperanta, 10-paĝa, kompilita de

B. J. Chambers (KH6GT; 1740 Nakula St., Wahiawa,

Havajo 96786). Akirebla ĉe li kontraŭ 2 respondkuponoj.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

RADIO ROMA nun dissendas sian dimanĉan programon per ondoj 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs); samhore, tio estas de 20.00 h. ĝis 20.20 h. La unua parto de ĉiu dissendo temas pri "Novaĵoj el Italujo" (informoj pri la itala vivo kaj pri la mondaj problemoj el itala vidpunkto), kaj de tempo al tempo pri "Leterkesto" (korespondado kun la aŭskultantoj). La dua parto temas pri "Kuriero de Esperanto" (informoj pri Esperanto kaj pri eventoj ligitaj kun la monda lingvo-problemo). La redakcio: d-ro Antonio de Salvo helpata de d-ino Vera di Tocco kaj f-ino Mirella Merlani estos dankaj al aŭskultantoj, se ili bonvolos informi ilin pri aŭdebleco kaj doni sugestojn kaj rimarkojn pri la enhavo de iliaj elsendoj. Adreso: Radio Roma, Esperantofako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

RADIO SOFIA dufoje ĉiudimanĉe dissendas sian programon laŭ la jenaj horoj kaj ondoj: de 08.30 h. ĝis 08.55 h. per ondo 49.42 m (6070 kcs) kaj de 20.05 h. ĝis 20.30 h. per ondo 50.61 m (5928 kcs). La daŭra ekzisto de ĉi tiu programo dependas de la alveno de leteroj el la aŭskultantoj, kiuj estas petataj skribi kaj esprimi siajn opinion kaj dezirojn al Radio Sofia, Bulgarujo.

BRAZILIO. La stacio Rádio Clube de Sorocaba, fine de la pasinta jaro, dissendis intervjuon de s-ro Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, dum li vizitis Brazilon. La programo titolata "Sintezo de Esperanto", dissendata ĉiulunde de 00.00 h. ĝis 01.00 h. per ondo 278 m (1080 kcs), povas esti aŭskultata en ĉiuj lokoj de Brazilo kaj en najbaraj landoj. Disaŭdigo per pli forta sendilo estas projektata en la nuna jaro.

LA AKTIVAJ PARTICIPAJ VERBOFORMOJ EN ESPERANTO

Ĉiuj, kiuj trastudis elementan lernolibron pri Esperanto, scias, ke la verboj (infinitivoj) povas alpreni plurajn formojn por indiki tempojn kaj modojn. Plej uzataj estas la finaĵoj AS, IS, OS, US kaj U. La participaj finaĵoj estas, por la aktivaj (agantaj) modoj ANT', INT' kaj ONT'. Tiuj formoj povas esti jen ADJEKTIVAJ, jen ADVERBAJ. Kiam ili ludas la rolon de adjektivo, ili finiĝas, kompreneble, je A (ANTA, INTA, ONTA).

La falanta stelo, la kantanta knabino (la stelo, kiu falAS; la knabino, kiu kantAS)

La mortinta birdo, la droninta hundo (la birdo, kiu mortIS; la hundo, kiu dronIS)

La venonta monato, la grumblonta patro (la monato kiu venOS; la patro, kiu grumbLOS)

En siaj adverbaj formoj (ANTE, INTE, ONTE), tiuj participaj formoj ofte reprezentas preskaŭ kompletan subfrazon, kiun multaj naciaj lingvoj ne povas reprodukti tiel koncize, kiel tio eblas en Esperanto. Ekzemple:

Studinte la tutan tagon, li laciĝis = Post kiam li estis studinta . . . ktp.

Tradukonte la ekzercon, vi studu unue la novajn vortojn = Antaŭ ol vi komencos traduki....ktp.

Vi nun studu la sekvantajn ekzemplojn kaj klopodu imiti tiujn formojn en viaj propraj skribaĵoj. Ili certe kontribuos al la flueco de via stilo kaj igos vin pasi de la stadio de "komencanto" al tiu de "progresinto". Atentu, tamen, ke vi rajtas uzi tiujn adverbajn participojn, nur kiam la subjekto, kaŝita en ĝi, estas la sama kiel la subjekto de la ĉefa frazo. Estante malsana (ĉar MI estas malsana), mi restas hejme. (mi....mi) Estante malsana, li restas hejme (= ĉar LI estas malsana, li restas hejme). Estante malsana, mia patrino restas hejme. Tiu frazo NE povas signifi, ke la patrino restas hejme pro tio, ke VI estas malsana (du malsamaj subjektoj), sed ĉiam signifas, ke la patrino estas malsana, kaj ke, pro tio, ŝi (la patrino) restas hejme. Se via patrino restas hejme pro tio, ke VI estas malsana, tiam vi devas diri tiel: Ĉar mi estas malsana, mia patrino restas hejme. En tiaj kazoj do ne eblas uzi la partecipan adverbajn formojn. Eraraj do estas frazoj kiel:

Sekvante la ekzemplon de Zamenhof, Esperanto venkos.

Ĝenerale parolante, la kongreso estis sukcesa. Biciklante kontraŭ la vento, mia koro bategis.

Jen kelkaj ĝustaj ekzemploj:

Ne farinte sian eblon, la kursano malsukcesis en la ekzameno.

Agante tiel, ili sendube ne faras bonan servon, nek al la lingvo mem, nek al la studentoj.

Falinte teren, la akcidentulo ne ekstaris, sed restis senmova sur la pavimo.

Alkurintaj piedirantoj volis helpi lin, sed malmulton ili povis fari.

Venigita kuracisto, zorgeme esplorinte la viktimon, konkludis, ke li ne estas grave vundita.

Forlasinte sian patrolandon, li eksentis grandan nostalgion.

Irante eksteren, vi surmetu surtuton.

Parolonte, li ektusis.

♦ ♦ ♦

Fraŭlino Anat Zduński, Israelo, sendis al la redakcio de tiu ĉi rubriko kelkajn ĉarmajn poeziaĵojn. Jen sekvas kelkaj el ili:

Verdokula saĝa kato
Ĉiam sidis sur la mato.
Mi demandis: — Diru, kato,
Kial sidas vi sur mato?
Pro malvarmo? Aŭ pro timo? —
Diris kato: — Pro la rimo. . .

Oni demandis al la simio
Ĉu kredas li en evolucio.
Venis respondo de la simio:
— Gardu min Dio! —

Estis konata la patro de Jaĉjo
Kiel sufiĉe malparolema,
Kvazaŭ la vortoj estus arĝento.
Foje demandis lin fil' scivolema:
Scii mi volas pri la serpento,
Ĉu voston li havas laŭ la natur'.
Pensis longege lakona paĉjo
Kaj fine diris: "Nur".

SAĜECO DE INFANO



La avino kartludis kun sia nepo. Baldaŭ ŝi ekrimarkis, ke la juna knabo ludas false kaj ŝi admonis, dirante: "Ĉu vi scias, kio okazas al falsludantoj?" "Certe, avino, ili ĉiam gajnas! "

TEJO-redaktoro
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-
Sterkrade,
F. R. Germanujo

"KIEL ESPERANTISTIGI POLAN BEBON?"

Sufiĉe entreprenema grupo da polaj gejunuloj troviĝas en Tarnowskie Góry, mezgranda industria (ĉefe minista) urbo en la provinco Katowice.

Sub la gvido de lerta organizanto Jan Szoltysek en tiu urbeto floras riĉa kluba vivo junulara; nelaste kelkaj klubanoj konatiĝis kiel la famiĝanta esperantista muzikgrupo "Suninfanetoj", kiu antaŭ nelonge ankaŭ — ĉifoje kun iom pli modesta sukceso — ŝerce provis veki intereson de ĉarma bebo pri nia lingvo. La apuda foto montras al vi la simpatiajn knabojn; la okulvitrulo estas la supre menciita aktivulo Jan Szoltysek; kiu ŝatus kontakti niajn entreprenemajn muzikistojn, skribu al: "Suninfanetoj", ul. 22 Maja 49, Tarnowskie Góry, Pollando.



KORESPONDA SERVO DE TEJO

Certe kelkaj amikoj ankoraŭ memoras, ke jam antaŭ multaj jaroj oni de tempo al tempo aŭdis bruojn pri ia Koresponda Servo de TEJO, kiu funkciis en Pollando. Tamen ĝis nun neniam videbliĝis konkretaj aferoj. Tio lastatempe iom ŝanĝiĝis; dum la jaro 1972 Jadwiga Greger el Sopot (Pollando) transprenis gvidadon de tiu — se ĝi bone funkcias — gravega servo de TEJO. Jam nun videbliĝas la unuaj konkretaj rezultoj. Eldoniĝis la adresbultenoj n-ro 1 kaj n-ro 2, tria baldaŭ sekvos, — donante nomojn, adresojn, aĝojn kaj ŝatokupojn de la koncernaj korespondemuloj. La bultenoj haveblas kontraŭ unu internacia respondkuponon ĉe: Koresponda Servo de TEJO, ul. Kujawska 24, Sopot (Pollando). Same oni kompreneble volonte akceptos sinanoncojn de kaj kluboj kaj individuaj junaj esperantistoj, kiuj ŝatus trovi korespondamikojn el fremdaj landoj. La adresoj aperos en sekvonta bulteno, senpage; tamen, kiu deziras kopion de ĝi, tiu devas same aldoni respondkuponon.

NOVAĴLETERO EL SUDA VJETNAMUJO

Por eviti la impreson, ke en tiu ĉi numero temas nur pri iaspecaj polaĵoj, jen ankoraŭ informoj el sudorienta Azio.

"Estimata samidean(in)o, esperantaĵo estas malfacile

havebla en nia lando Sud-Vjetnamujo. Pro tio, ni permesas nin daŭre sendi al vi ĉi tiun novaĵleteron en kaj pri nia Internacia Lingvo Esperanto. Tutkore ni esperas, ke la legaĵo helpos vin plibonigi vian Esperanton kaj pli bone kompreni nian lingvan movadon en Sudorienta Azio kaj tra la tuta monda familio de la esperantistoj...."

Jen la enkonduko al la unua "Novaĵletero" de la Agadgrupo por Esperanto en Sajgono, 9-paĝa multobligita bulteno pri la Esperanto-movado en tiu parto de la mondo. Ĝi enhavas aron da interesaj informoj pri kunvenoj, kursoj kaj eldonado. Baldaŭ oni aperigos tradukon el la palia lingvo de la Budhisma Sutra-ro "Dhammapado", dulingvan frazaron ktp. Jes, estas kelkaj ĉefe junaj homoj tie, kiuj malgraŭ la konataj malfacilaĵoj fervore laboras por disvastigi nian komunan lingvon. Sincerajn kaj tutkorajn gratulojn! Se vi volas ricevi la novaĵleterojn, aŭ simple nur subteni la menciitajn agadojn, petu informojn de f-ino Nguyen-thi-Kim-Chau, 12 A -28, Phan-Boi-Chau str., Gia-Đinh, Suda Vietnamujo (aerpoŝta sendo de unu numero kostas proksimume 2,— guldenojn).

STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO (STELO) — UTOPIO AŬ REALA ŜANCO?

Ne nur muzikistoj kaj la Koresponda Servo, sed ankaŭ STELO, aŭ pli bone la studenta komisiono de TEJO, hejmas en Pollando.

Legante la nomon "STELO", certe multaj memoras, ke iam estis sendependa, forta studenta unuiĝo esperantista, kiu nur dum la lastaj jaroj iom post iom iĝis parto de TEJO. Ĝiaj aktivuloj transiris aŭ al la ĝenerala agado movada aŭ perdiĝis, ĉar ili ne plu estas studentoj. Ne plu estis la brilaj studentaj konferencoj. Anstataŭe nun estas "studenta tago" kaj "STELO-balo", kutimaj programeroj de la Internaciaj Junularaj Kongresoj de TEJO. Tamen leviĝas demando, ne nur flanke de la nuna respondeculo, TEJO-estrarano Janusz Wolak, ĉu specife studenta agado ne ankaŭ havus siajn avantaĝojn, nome pli bonajn eblecojn kunlaborigi, interesigi kaj aktivigi la studentan medion kaj la unuiĝojn kaj la unuopajn junajn gestudentojn, kiuj ekinteresiĝu pri niaj aferoj, partoprenu internaciajn aranĝojn je altlerneja nivelo, kie eblas vera opiniinterŝanĝo. Por diskutigi eblecojn de revivigo de studenta agado, kaj por kolekti interesojn, kiuj kunlaborus tiucele, nome de la Studenta Esperantista Klubo en Gdańsk li invitas studentajn reprezentantojn al partopreno de STELO-konferenco '73, kiu okazos en Gdańsk de la 12a ĝis la 19a de julio, finante per komuna karavano al Sarajevo, kie tuj poste okazos la IJK de TEJO.

Praktika demando estus do simple ankaŭ al tiuj, kiuj ne povos veni al Gdańsk sed tamen interesiĝas: sciigu, kiuj studentaj rondoj esperantistaj estas en via lando, kiom da membroj ili havas, kaj kiuj estas la aktivuloj, laŭeble aldonante iliajn adresojn. Certe interesaj estos ankaŭ la lastjaraj kaj la planataj agadoj iliaj. Ĉu STELO nun denove ekrealiĝas aŭ ĉu ĝi por ĉiam restos utopio de malmultaj aktivuloj/funkciuloj eble nelaste dependas de via reago.

La STELO-adreso estas la sama, kiel tiu de la Koresponda Servo: ul. Kujawska 24, Sopot, Pollando.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 467, 1973-04-01

Aktiveco de du UEA-servoj en 1972

MAGNETOFONA SERVO

La nombro de la disponeblaj programoj de la Magnetofona Servo kreskis dum 1972 de 292 al 348 ĉefe pro la surbendigoj faritaj dum la Universalaj Kongresoj en Vieno kaj Portlando.

Denove pli da personoj mendis programojn ol dum antaŭaj jaroj: por 25 mendoj estis kopiitaj pli ol 90 horoj da programoj; (dum 1971 estis 70 horoj, dum 1970 nur 20 horoj). Dank'al tiuj relative multaj mendoj pliboniĝis la financa situacio de la Servo, kiu unuafoje montris profiton de pli ol cent dolaroj.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Dum la jaro 1972, Koresponda Servo Mondskala iomete stagnis pro la ripetitaj strikoj de poŝtistoj en diversaj okcidenteŭropaj landoj. Estis starigitaj nur 395 novaj slipoj (kontraŭ 428 en la jaro 1971), 53 korespondpetoj estis grupigitaj kaj koncernis proks-e 955 novajn gelernantojn de Esperanto. Notinde estas, ke ĉiujare pli ol 200 antaŭaj geutiligintoj sendas denove korespondpetojn. La Servo forsendis 601 rektajn poŝtaĵojn al alskribintoj kaj disdonis 1408 adresojn ĉu de individuaj esperantistoj ĉu de Esperanto-grupgvidantoj. La regularo pri funkciado de la Servo troviĝas en *Jarlibro*, dua parto. La servon gvidas f-ino C. Hueter, 12 rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Kleemann, D., F.R. Germanujo.
Nuez Pérez, P., Hispanujo.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

222 O. de Souza Mello, 223 N. Dutra d'Amorim, 224 H. Fóscolo, 225 C. Rezende, Brazilo. 226 E.B. Knight,

Britujo. 227 M. Oksala, 228 E. Syrjänen, 229 H. Tuomola, Finnlando. 230 T. Aboulzahab, 231 A. Bepperling, 232 H. Schütt, 233 H. Woestemeyer, F.R. Germanujo. 234 J. Castelltort Riba, Hispanujo. 235 W.R. Harmon, Japanujo. 236 N.L. Daams, 237 J. Flach, Nederlando. 238 A. Armanis, 239 P. Engen, Norvegujo. 240 H. Almén, 241 K. Bengtsson, 242 N. Brandemar, 243 S. Edvardsson, 244 Gävle Esperantoförening, Svedujo. 245 S. Chobanoff, 246 H. Ledeén, 247 Wm. P. McGrogan, 248 E.D. Walters, Usono.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-07-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Argentino: José Drucker, FD Río Turbio. **Ĉeĥoslovakujo:** Karel Pič, VD kaj FD Litomyšl; Pavel Pol-

KALENDARO

Majo

- 12-13 4a kultura semajnfino, Renens, Svislando
- 12-18 25a kongreso de IFEF, Aarhus, Danlando
- 19-20 3a amik.-kongreso, Grésillon
- 20 Trilanda E-renkontiĝo, Eindhoven, Nederl.
- 27 15a provinca (Barcelona) E-renkontiĝo, Calella de la Costa, Hispanujo

Junio

- 2-3 Norvega Esp.-kongreso, Haugesund
- 9-11 Eŭropa E-kong; belga, franca, germana (FR), luksemburga, nederlanda kongresoj, Luksemburgo.
- 9-11 Kongreso de sveda E-federacio, Kalmar
- 17-28 3a Int. E-feriado, Miedzyzdroje, Pollando
- 20 Limdato por aliĝo al Universala Kongreso
- 29-30 5a Franca-Hispana E-renk., Bilbao, Hispan.

Julio

- 1-7 Somera universitato, Jyväskylä, Finnlando
- 1-14 Internaciaj E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo
- 1-22 Kulturaj E-semajnoj, Grésillon, Francujo
- 3-13 Skolta E-tendaro, Bregenz, Aŭstrujo
- 5-22 Pedagogia E-seminario, Primošten, Jugosl.
- 7-15 Internacia E-tendaro, Päijänne, Finnlando
- 8-11/8 Somera E-tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakujo
- 8-14 Somera E-universitato, Gyula, Hungarujo
- 8-22 Somera E-lernejo, Dudince, Ĉeĥoslovakujo
- 15-28 Somera E-lernejo, Liptovský Mikuláš, Ĉeĥ.
- 16-29 Inter. E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo
- 18-27 6a IREN-renkontiĝo, Abaliget, Hungarujo
- 19-24 Hispana kongreso de Esperanto, Madrid
- 21-27 7a konferenco de ILEI, Maribor, Jugoslav.

nický, D Poděbrady. **Danlando:** Svend Dragsted, D Birkerød. **Finnlando:** Irja Miettinen, D Lappeenranta; Unto Mustonen, FD Lappeenranta; Heimo Lempiäinen, FD Tuusula. **Francujo:** Frédéric Zipfel, FD Strasbourg. **F.R. Germanujo:** Werner Hohl, D Runkel. **Hispanujo:** F. Rueda Fernandez, FD Jaén. **Koreujo:** Bongkil Kang, FD Milyang; Hyeon-Su Gim, D Sineong; Gongha Ri, FD Taegu; Yung-Myung Kim, FD Taegu. **Usono:** E.J. Zais, D kaj FD Austin; John L. Lewine, FD West Stockbridge. **Zairo:** Nduantoni-Bakidia Ngangu, FD Lukala (Nkandu).

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972, Unua Parto, pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj).

Britujo: Peterlee. **Danlando:** Holte. **Francujo:** Avignon, Besançon (FD Trésorier), Roderen près Thann (JD), Thann (JD). **F.R. Germanujo:** Eppenheim. **Hispanujo:** Alicante. **Italujo:** Roma (JD). **Usono:** Austin (D Parker), Rensselaer.

DONACOJ 1973 (Gld.)

Ĝenerala kaso: Hispanujo: L. Armadans, 1,99; J. Castelltort, 6,18; J. Chaler, 5,98; J. -A. Madrazo, 0,99; J. Perarnau, 5,98. Sumo ĝisnuna: 340,74.

Patronaj membroj A de TEJO 1973: 14 G. Pirlot, Belujo. 15 S-ino T.B. Sparrow, Britujo. 16 M. Julien, Francujo. 17 J. Azcuenaga-Vierna, Hispanujo. 18 E. Burg, Nederlando. 19 L. Minnaja, Italujo. 20. O. Olsson, Svedujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

Librojn kaj broŝurojn elĉerpitajn proponas al vi je favoraj prezoj, el sia kolekto de duoblaĵoj, la Biblioteko Hodler de UEA. Petu liston kaj kondiĉojn ĉe: Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Asocio Monda Turismo (adreso de la sekretario: P.K. 45, Sofia-C, Bulgarujo) komencis uzi okulfrapajn bildojn, kia estas la dekstra, en miloj da ekzempleroj sur siaj afiŝetoj por reklami la Internacian Lingvon kiel la komunan lingvon en la ĉiam vastiĝanta turismo.
"Viaj ferioj estos pli belaj per Esperanto" — jen estas la slogano de Monda Turismo.



- 21-28 Kultura-turisma E-semajno, Banská Bystrica, Ĉeĥoslovakujo
- 21-28 29a kongreso de T.E.J.O., Sarajevo, Jugosl.
- 22-29 Internaciaj feriaj kursoj, Helsingør, Danlan.
- 22-5/8 Internaciaj semajnoj, Grésillon, Francujo
- 24-27 Antaŭkongreso en Ljubljana, Jugoslavio
- 24-28 41a kongreso de LIBE, Beograd, Jugoslav.
- 25-25/8 Kampado, Cévennes, Francujo
- 28-4/8 Kongreso de vegetara unio, Ronneby, Sved.
- 28-4/8 58a Universala Kongreso, Beograd, Jugoslav.
- 28-4/8 13a Int. infana kongreseto, Beograd, Jugosl.
- 29-11/8 Somera E-lernejo, Košice, Ĉeĥoslovakujo
- 30-5/8 46a kongreso de SAT, Toronto, Kanado

Aŭgusto

- 1-14 Somera Esperanto-kolegio, Liberec, Ĉeĥos.
- 1-14 Int. E-kurso, Pamporovo, Bulgarujo
- 5-12 Oficiala Postkongreso, Ateno, Grekujo.
- 1-14 19a int. E-ferisemajno, Krommenie/Assendelft, Nederlando
- 5-12 Oficiala postkongreso, Ateno

- 5-26 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo
- 6-13 Postkongresa kultura feriado, Primošten, Ju.
- 11-13 60a japana E-kongreso, Kameoka, Japanujo
- 15-18 Intern. turista postrenkontiĝo, Esztergom, Hungarujo
- 16-29 Int. E-kurso, Pamporovo, Bulgarujo
- 26-9/9 Du kulturaj semajnoj, Grésillon, Francujo

Septembro

- 2-7 Studsemajno de int. fervojista kontraŭalkoh. asocio, Rapham, Norvegujo
- 2-8 Eŭropa ferio-semajno, FÜRIGEN, Svislando
- 8-9 Amika renkontiĝo E., Dudince, Ĉeĥoslov.
- 8-10 E-renkonto dum la foiro, Plovdiv, Bulgar.
- 15-22 44a itala kongreso de Esperanto, Trento
- 16-29 9a int. E-feriado, Miedzygórze, Pollando
- 29-30 5a kultura semajnfino, Renens, Svislando

Oktobro

- 1-7 6a pupteatra int. festivalo, Zagreb, Jugosl.
- 1-7 Intern. renkontiĝo de infanoj, Zagreb, Jug.



Anoncetoj

TARIFO

Ĉiu vorto kostas 0,50 gld.
(t.e. 1 internacia respond-
kupono). Pri la enhavo de
la anonc(et)oj respondecas
sole nur la anoncantoj.

Deziras korespondi
20-jara studentino
de pedagogia
fakultato: **Helena
Arnoštová,**
Jezdecká 35,
CS-796 01
Prostějov,
Ĉeĥoslovakujo.

P.M. sendas kontraŭ bildoj, libroj, broŝuroj, revuoj
ktp. pri arto: **Luis Vicino, 2272, Casilla Correo
Central, Buenos Aires, Argentino.**

Mi deziras kontakti tutmondajn filatelajn asociojn
pri muzika temo por informoj. Skribu Esperante aŭ
france, itale, hispane, angle, germane, ruse al: **G.
Champagne, 19 rue du Rajat, F-87000 Limoges,
Francujo.**

Kiu havas ekzemplerojn de la revuoj *Literatura Mon-
do*, *Sennacieca Revuo*, *Malgranda Revuo* kaj *Litera-
tura Foiro*? **R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá
(Barcelona), Hispanujo.**

Fraŭlino Claude de Coudenhove, 42-jara, laboratoria
helpantino, deziras havi korespondanton aŭ kore-
spondantinon en Maroko, adreso: 104 faubourg
Madeleine, F-45000 Orléans, Francujo.

Ernesto Ŝlezinger, pk 35, Cluj, Rumanujo, interŝan-
ĝas librojn, revuojn, BK, PM neuzitajn.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700
København, daŭre akceptas ĉiaspĉcajn poŝtmarkojn
por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝt-
markojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi
povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu indivi-
duajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu
vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M.,
12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Fran-
cujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

"Aktiveco de la monato" estas la nova, premgrupa
agado, kiu post nur kelkaj monatoj jam kolektis
celkonsciajn kunlaborantojn en 24 landoj. Ĉu ankaŭ
vi deziras envicigi vin en tiun ĉi gravan laboron por
Esperanto? Se jes, bv. skribi al Inter-grupo, Box
55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib,
DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti
ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skri-
bu por nia bulteno.

"Univox" — praktikaj kursoj en Esperanto kaj 22
aliaj lingvoj — troviĝas sur diskoj (tonkartoĵoj) aŭ kase-
toj C-60. (Kasetoj nun riceveblaj ankaŭ por aliaj lin-
gvoj ol Esperanto!) Paralelaj tekstoj ebligas 506
kombinaĵojn. Ordinara sonbendo, 9,5 cm/sek., nur
en Esperanto. Petu informojn: INTER-grupo, Box
55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Telefono:
(031) 48 95 97.

Korespondant(in)ojn serĉas por siaj ĉiuaĝaj divers-
regionaj lernant(in)oj: s-ro Pierre Delaire, B.P. 901,
F-45010 Orléans, Francujo. Ne respondos sed trans-
donos la petojn. Indiku aĝon, profesion ktp.

Preparu vin por la 58-a en Beogrado! Informiĝu kaj
konatiĝu antaŭ via vojaĝo pri popoloj, lingvoj, klima-
to, turismo ktp. de la kongresaj lando kaj urbo. Stu-
du praktikajn konsilojn kaj ekzercojn utilajn por ĉiu
kongresonto. Mendu la kajeron "Preparu vin por la
58-a", pagante 5,00 skr aŭ 5 rpk al Inter — Agad-
grupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Goten-
burgo 55, Svedio. Sveda poŝtĉekkonto: 42 66 60 -7.

**Interesiĝantoj pri matematikaj kaj stokastikaj termi-
noj** skribu al prof-o Olav Reiersøl, Matematisk Insti-
tutt, Postboks 1053, Blindern, Oslo-3, Norvegujo.
Oni diskutos pri elekto de tiaj terminoj en la fakkun-
veno de ISAE dum la UK en Beograd.

Radio-bulteno n-ro 4 estas preta. Artikoloj pri Espe-
ranto en Radio, televiziaj satelitoj, konsiloj kaj sug-
estoj. Prezo (inkluzive jaran kotizon kaj 20 poŝtkar-
tojn) 5,20 skr aŭ 6 rpk. Inter — Societo por la Inter-
nacia Lingvo en Radio, Box 55028, S-400 53 Goten-
burgo 55, Svedio. Sveda poŝtĉekkonto: 42 66 60-7.


Korespondemuloj! Se vi publikigas korespondo-pe-
ton en nia revuo, kunsendu vian foton. Ĉiumonate
la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-
anoncantoj por senpaga aperigo apud la koncernaj
pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

Por fine venki kaj tiel certigi al la esperantistaro
ankoraŭ unu konstantan programon en la Internacia
Lingvo, vi estas insiste petata skribi al Radio de
Svedio. Ĝuste nun grava reorganizado de la programa
agado kaj samtempa funkciigo de novaj, fortaj sendi-
loj povas favori al Esperanto, kondiĉe ke vi skribas
kaj petas programojn. Skribu nun al la nova direkto-
ro de la koncerna fako, referencante al Inter — Agad-
grupo por Esperanto. Jen lia adreso: S-ro Bengt
Gustafsson, Dir. de Progr. por eksterlando, S-105 10
Stokholmo, Svedio.

Deziras aĉeti, interŝanĝi nudfotojn kun foto-amato-
roj; **Leif Heilberg**, P.O. Box 22159, San Francisco,
Ca 94122, Usono.

Ludoviko en Nederlando, supera kurslibro por franc-
lingvanoj, multe progresigos vin. Prezo afr.: 35 fr.fr.
Ĉe la aŭtoro: **Pierre Delaire**, B.P. 901, F-45010 Or-
léans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de
sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040
Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) po-
vas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi
kontraŭ 1 respondkupono kompletan liston de siaj
programoj.



Pri radiotekniko,
muziko ktp.
korespondi deziras
17-jara liceano
Marko Busiakiewicz,
ul. Brzezińska 14,
PL-95-040 Tuszyn
k/ Łódź, Pollando.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,— gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,— gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



Ni kredu, ke venos tempo,

kiam la transpago estos ebla kaj ni rememoros
pri la Fondaĵo "Canuto" kiel unu nobla, hela
paĝo de la historio de la Esperanto-movado.

— membro en Bulgarujo

Dank' al la Fondaĵo Canuto mi ricevis la revuon.
Mi ne havas sufiĉajn vortojn por rakonti mian
ĝojon.

— membro en Indonezio

Via helpo estas granda por la Esperanto-movado
en Litovio, ankaŭ por miaj gekursanoj.

— membro en Soveta Unio

Mi estas ege dankema al la Fondaĵo Canuto la
eblecon membriĝi kaj ricevi eldonaĵojn de UEA.

— membro en Egiptujo

Mi ne povas imagi mian vivon sen membreco de
UEA, revuo, jarlibro ktp.

— membro en Rumanujo

La Fondaĵo CANUTO estas speciala konto, en
kiun eniras mondonacoj kaj subvencioj, kaj el
kiu UEA pagas la membrokotizojn de meritaj
personoj en landoj, el kiuj ne estas eble libere
transpago al Nederlando. Donacojn por Fondaĵo
Canuto akceptas la Centra Oficejo kaj la landaj
kotizperantoj de UEA.

cial

LA KONATA LINGVO-INSTITUTO

EFEKTIVIGOS

EN JULIO (2/11) KAJ AŬGUSTO (20/31)

INTERNACIAJN

ESPERANTO-KURSOJN

ĈE LA SUDA MARBORDO

EN RAVA KAJ LUKSA

FERIOPARADIZO

VENU AMASE

KAJ SKRIBU

AL

D-ro CORREIA COIMBRA

VILAMOURA

ALGARVE

PORTUGALIO



LA 3a INTERNACIA PUPKONKURO PER POŝTKARTOJ! SENDU TUJ!

Sendu vian karton tuj, jam hodiaŭ. Rakontu pri
la konkuro al viaj geamikoj (ankaŭ ne-esperantaj).
Vi devas nur sendi poŝtkarton al la adreso: **LA
TAGO DE TURKU**, Box 66, SF-20100 TURKU 10,
Finnlando.

La urbo lotumos inter la senditaj kartoj dek belegajn
pupojn. La kartoj devas esti en Turku je la 15.9.
1973. Al ĉiu karto skribu vian nomon kaj adreson.

URBA TURISTA OFICEJO


Turku, Finnlando

— pupkonkuro por la tuta Esperantujo!

Se vi vere ne scias

kion donaci ĉi-jare,
pensu pri Donaca Karto
de la Libroservo de UEA.

Vi pagas 5,- guldenojn
(aŭ egalvaloron), plus
la sendokostoj 10%, kaj
ricevas specialan
karton, kiun vi plu-
sendas — kun viaj
varmaj bondeziroj,
kompreneble —
al tiu problema
persono. Ĝi (aŭ
li) povos tiam
aĉeti laŭ propra
elekto kiun ajn
libron aŭ diskon
aŭ abonon ĉe la
Libroservo de UEA.



LIBROSERVO DE UEA
NIEUWE BINNENWEG 176
ROTTERDAM - 3002
NEDERLANDO